

ESPERANTO INTERNACIA

Monata organo de la Internacia Esperanto - Ligo

Vol. 2, N-ro 10

Oktobero 1938

Eldonanto : Internacia Esperanto-Ligo,
Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo.

Adreso de la Redakcio : Teo JUNG
Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando.



S-ro Arthur C. OLIVER
Estrarano de IEL

Anglo, naskita la 8-an de majo 1912. Esperantisto de 1926. Honora kasisto de Brita Esperantista Asocio. Prezidanto de la BEA-Komitato por ĝeneralaj aferoj kaj propagando.

★

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan !

Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
Traboras la monton granitan.

L'espero, l'obstino kaj la pacienco —

Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
Atingos la celon en gloro.

(D-ro Zamenhof: LA VOJO.)

Racia Kunlaboro

La 30-a Universala Kongreso nun estas malantaŭ ni, kaj ni turnas niajn pensojn al la aŭtuno kaj vintro, kiuj por ni, esperantistoj, estas la laborsezonoj. Post la somero kun ĝiaj libertempoj kaj ĝojoj, la homoj estas pretaj dediĉi iom da tempo al serioza laboro. La Kongreso estis vere bela manifestacio de la Movado, kaj montris, eĉ pli klare ol antaŭe, ke nia lingvo vivas kaj ke esperantistoj, kvankam devenintaj el diversaj landoj, estas kvazaŭ membroj de la sama nacio. Plej rimarkebla estis la universala akcepto kaj praktikado de la Interna Ideo, kaj eĉ tiuj el ni, kiuj ĉeestis multajn kongresojn kaj kutimiĝis al konversacio kun samideanoj el aliaj landoj, forlasis Londonon kun renovigitaj fortoj kaj inspiro, ĉar la « granda familia rondo » de nia Himno estis vere aplikebla al la kongresanaro. La unufamilieco estis ĉefe rimarkebla en la momentoj de niaj komunaj ĝojoj kaj profunda malĝojoj. Ofte ne necesis diri vorton, ĉar en la silento oni plej facile sentis la simpatian kaj la veran signifon de tiu vorto «samideano».

Post tiu bela Kongreso ni estas pretaj ataki la laboron ne nur kiel sanktan devon sed plue kiel veran plezuron, veran ĝojon en la scio ke la laboro estas utila, ĉar la mondo hodiaŭ ege bezonas la influon de nia Movado.

Ni laboros diverse maniere. Estos kelkaj, kiuj instruos. Aliaj, kiuj donos forton kaj vigecon al klubo vivo, kiuj gvidos la nove venintajn anojn kaj montrus al ili, kiel ili plej bone povos helpi, kaj ankaŭ instigos en ili fortan deziron helpi. Estos aliaj, izolitoj, kiuj korespondos kaj tiel kreos kaj nutros internacian amikecon. Estos ankaŭ aliaj, kies cirkonstancoj ne donas la eblon fari multon por la lingvo, sed kiuj malgraŭ tio

daŭre portos la stelon (aŭ en la buton-truo, aŭ pro politikaj cirkonstancoj nur en la koro). Ĉiuj ĉi tiuj helpos. Ili donos solidecon al la movado, kaj, se la individuaj rezultoj eble ne estos grandaj, ili, pro la penado kaj bonvolo, faros grandaj impresoj sur la mondon kaj instigos aliajn sekvi.

Nia movado havas multajn fervorajn kaj sindonemajn laborantojn, kiuj dediĉas kiel eble plej multe da tempo, mono kaj energio al la disvastigado de Esperanto. Kun tiom da laboremo, estas iom strange ke nia lingvo ne atingis pli brilajn kaj gravajn sukcesojn. Ĉi tiun aferon mi multe pripensis, kaj dum la Kongreso diskutis kun diversaj amikoj. La ĝenerala respondo ricevita estis ke la esperantistaro ne sufiĉe discipline agas. Oni diris ke niaj sukcesoj estas plejparte atingitaj per bonŝanco kaj hazardo, kaj nur malofte ili estas la rezultoj de bone organizita atako de la tuta samideanaro.

Multaj esperantistoj faras nur la laboron, kiun ili ŝatas fari aŭ mem elpensis, kaj ĉiam lasas al aliaj personoj la plenumon de alvokoj dissenditaj de centraj kaj landaj asocioj. Estas nenia dubo ke, se ĉiuj niaj anoj estus agintaj laŭ la diversaj alvokoj de niaj institucioj, la lingvo estus nun multe pli bone konata en la ekstera mondo, kaj ankaŭ multe pli uzata de grandaj instancoj kaj registaroj. La esperantistaro verŝajne ne konscias ke el la koncentrigado de niaj individuaj malfortoj rezultos nekontraŭstarebla forto. Ili kredas ke ĉiam estas sufiĉe da aliaj personoj por fari tiun laboron, kun la konsekvenco ke nur tre malmultaj faras ĝin, kaj eksteruloj rimarkas nian malfortan aspekton.

Kiel ekzemplon pri la mirindaj rezultoj de disciplina laboro, oni povas citi nunan eŭropan diktatoron, kiu antaŭ

nur kelkaj jaroj estis tute nekonata kaj ordinara viro. Li komencis sian politikan agadon kun tre malmultaj subtenantoj, sed ili sciis kiel discipline sekvi la ordonojn de la estro. Ili kunigis siajn fortojn kaj tuj ekkreskis. Ĉiu nova varbito same bone sekvis la regulojn de la partio kaj la fina rezulto estas ke tiu viro nun estras la landon.

Ni, esperantistoj, estas armeo, kaj, kvankam mi plene konsentas, ke ne estas dezirinde ke ĉiu el ni agu kiel maŝinoj, mi estas certa ke se pli ofte ni formetos la propran opinion por plifortigi komunan atakon per laboro en la sama momento kaj en la saman direkton, la movado disvastiĝos je tute neatendita rapideco.

Kelkaj personoj diras ke disciplino ne estas dezirinda inter esperantistoj, kaj ke ĉia esperanta laboro devas esti farata libervole kaj ne pro ricevita ordono. Laŭ mi, ĉi tiuj miskomprenas la signifon de la vorto. Ne temas pri la forigo de demokrateco en la movado, sed pri la ordigo de niaj klopodoj por alporti la plej bonajn rezultojn. Individuo povas disciplini sin, por ke lia laboro estu kiel eble plej fruktodona, kaj se ni de tempo al tempo komune faros paŝon antaŭen, kiun sola ni ne povus fari, ni neniel kripligos nian demokratecon sed agos plej racie kaj saĝe.

La fadenoj de araneajo estas indvidue malfortaj kaj juna infano facile rompas ilin, sed, se oni kunmetas milojn da tiuj fadenoj, tiel ke ili kuŝas unu apud la alia paralele, ili faras ŝnuron kapablan ligi eĉ la plej fortan viron. Ni laboru laŭ niaj personaj trajtoj, sed ni samtempe akceptu la gvidadon kaj alvokojn de niaj organizoj.

Dum la Kongreso, s-ro Ernfrid Malmgren enkondukis novan projekton, sub la titolo « Varb-Garantiantoj ». Kelkaj demandas, ĉu ĉi tiu sukcesos aŭ fiaskos; sed la respondo estas en la manoj de la esperantistaro, ĉar se niaj agos discipline, la projekto ne nur sukcesos sed alportos pli da forto al la movado ol iu alia ĝisnuna laboro. Ĝi estigos generacion, kiu mem havos seriozan intereseon en la lingvo kaj garantios ege brilan estontecon.

Mi jam menciis la esperantistojn, kiuj aŭ loĝas en nefruktedonaj lokoj, aŭ laboras sub tute nefavoraj cirkonstancoj, kaj al ĉi tiuj mi volas skribi kelkajn apartajn vortojn. Se ili ekperdas kuraĝon pro la fakto ke ilia laboro ne alportas videblan sukceson kaj ŝajne faras nian bonon, mi rekomendas al ili legi denove « La Vojo'n », ĉar en ĝiaj inspiroplenaj vortoj oni nepre trovas novan forton kaj kuraĝon. Mi ankaŭ diras al ili ke ĉia ajn uzo de la lingvo estas utila laboro. Se ili uzas Esperanton eĉ nur por pligrandigi privatan kolekton da poŝtmarkoj aŭ ilustritaj poŝtkartoj, ili

Londona Postkolekto

Kunvenoj de T.A.G.E.

Dum la 30-a Universala Kongreso de Esperanto, TAGE aranĝis du kunvenojn, al kiuj oni invitis ĉiujn geinstruistojn, kaj unu kunsidon speciale por TAGE-anoj. Prof. COLLINSON, el la Universitato de Liverpool, prezidis en ĉiuj kunvenoj.

La unuan kunvenon, mardon la 2-an de aŭgusto, partoprenis pli ol cent personoj.

Prof. COLLINSON prelegis pri la problemo: « Baza vortaro en la instruado de internacia lingvo ». Li difinis tri vidpunktojn, pri traktante minimuman vortaron en internacia lingvo: 1. la logikon, ekzemple Basic English; 2. la metodon de kelkaj usonanoj: kalkulado de relativa ofteco, ekzemple la laboro de Thorndike; 3. la miksitajn metodojn, t. e. la metodon de Palmer kaj Hornby, instruistoj de la angla lingvo en Japanlando, kiuj modifis la metodon de vortofteco laŭ sia sperto kaj tiu de la japanaj instruistoj.

Li komentis pri la valoro de Basic English por la studado de la gepatra lingvo, ĉar ĝi reprezentas tre zorgan logikan analizon de la angla esprimo. Tamen li dubis, ĉu ĝi taŭgas kiel internacia lingvo, ĉar ĝi ne estas neŭtrala, ĝi ne forigas la malfacilaĵojn de la prononco kaj ortografio anglaj, kaj la angla parolanto emus forgesi, kiuj vortoj estas forlasotaj.

Konsiderante minimuman vortaron en Esperanto, li atentigis ke tiu vortaro povas esti pli preciza ol en la angla lingvo, citante: densa, dika; punkto, pinto, poento. Tamen en Esperanto estas danĝeraj vortoj, ekzemple: eventuale, fatale, respektive. — Anstataŭ redukti sinsekve la vortaron, oni povus procedi inverse kaj al tre malgranda nombro da radikoj, ekz. est-, hav-, al, iu, alia, si, kunkonstrui aŭ sintezi bazan vortaron, ekz. « havigi al si » = preni (kiun oni poste povas uzi kiel novan elirpunkton), « havigi al alia » = doni, ktp. Tia procedo, tamen, havas teoriantan preferon ol praktikan intereson.

La parolanto atentigis pri la neceseco scii, por kiu celo oni bezonas minimuman vortaron. Se estas kiel unu prepara stadio, por provizi materialon por la komenca lerno- aŭ legolibro, la vortelekto ne povas esti sama kiel eble por vojaĝo ktp. Sed oni nepre bezonas ankaŭ por Esperanto vortaron gradigitan por ŝpari tempon kaj klopodojn flanke de la instruisto, kiel multaj jam konstatis en la instruado de naciaj lingvoj.

Sekvis diskuto pri internacia minimuma vortaro por infan-instruado, kiu plifaciligos korespondadon kaj intervizitadon.

helpas. Cent personoj, kiuj uzas la lingvon por praktika celo, estas multoble pli valoraj ol mil aliaj, kiuj perfekte scipovas Esperanton, sed kiuj nek per eldiro, nek per skribo, helpas plifortigi sian movadon. Ofte mi opinias ke la pruvo de vera esperantista laboranto troviĝas pli en utiligo de la lingvo ol en lingvo-kapableco aŭ sukcesoj atingitaj.

Ni, do, reprenu nian taskon kun la firma decido persiste kaj discipline labori ĝis la fino. Ni ankaŭ rememoru ke « Unueco ja estas forto », kaj estonte agadu laŭ la sugestoj de niaj asocioj, por ke, kiel bone disciplinita anaro, ni posedu forton, kiun la sendisciplina mondo ne sukcesos kontraŭstari. Ek al laboro!
Arthur C. Oliver.

F-ino SAXL opiniis ke estas eble kolekti el diversaj libroj, ekz. « Juna Vivo », minimuman vortaron. Ŝi diris ke la Cseh-metoda kurso estas aplikebla por infanoj, sed kun aldonoj. La infanoj nepre bezonas verbojn, ĉar ili volas agi, kaj ankaŭ ŝatas la demandajn vortojn.

S-ro BUTLER aprobis vortaron sur bazo internacia pri interesajoj, kun la aldono de specialaj naciaj vortoj en la klaso mem, ĉar oni ne povas limigi la infanojn je internaciaj vortoj sole.

S-ro MUUSSES proponis ke oni atentu raporton pri la « Juna Vivo »-libertempo rilate la uzadon de vortoj inter la partoprenantoj.

S-ro SCOTT konsentis pri la ĝusteco de la konstato farita de f-ino Saxl ke la ag-vortoj estas tre gravaj por la infanoj. Li krome sugestis ke grandan utilon havus bildoj de agadoj, kaj ĉi aprobis la diron de s-ro Butler ke infanoj ŝatas lerni la nomojn de siaj ludiloj, ĉu tiuj estas internaciaj, do en la komuna bazvortaro, aŭ ne.

S-ro AARSE opiniis ke la studo de Esperanto laŭ kunmetitaj vortoj ne estas facila por la infanoj. La vorto mem devas havi signifon, ne pro radiko kaj aliaj partoj sed en si mem. Li konsideris ke simpla literaturo estas pli bezonata ol minimuma vortaro.

F-ino NOLLEIS diris ke la inteligentaj infanoj ŝatas vortofaradon kaj bezonas multajn substantivojn por ekzerci la gramatikajn regulojn laŭ tiu diverseco en la frazoj.

Sekvis paŭzo.

En la dua parto de la kunveno s-ro BUTLER klarigis, kiel li sukcesis viziti lernejojn — 100-150 en unu jaro — per la propono doni senpagan demonstracion en Esperanto.

S-ro ISBRÜCKER kaj JENSSON konstatis ke en iliaj landoj (Nederlando kaj Norvegujo) estas pli facile, proponi prelegon pri alia lando aŭ turista temo, uzante Esperanton kaj tradukante, ol peti permeson paroli pri Esperanto mem.

F-ino NIXON preparolis la bonege aranĝitan junulifeston de « Juna Vivo », la 10-17 aŭgusto en Groet, Nederlando, kaj konstatis ke ĝi estas la plej grava paŝo rilate la enkondukon de Esperanto en lernejoj, ĉar ĝi provizas celon al la infanoj mem. —

La dua kunveno okazis la 4-an de aŭgusto; proksimume 90 ĉeestis. La ĉeestantoj staris en silento unu minuton, dum ili memoris la grandan laboron de f-ino Margarete Saxl mortinta tiun tagon. Salutletero de TAGE estis legata; poste oni anoncis la kuraĝan agadon de la nederlanda firmo Muusses, entreprenanta la eldonadon de pedagogiaj libroj kiel TAGE-bibliotekoj.

Sekvis prelego de Prof. FLUGEL pri « Asketismo kaj pedagogio ». Tiel humore, tamen serioze, li pritraktis la temon ke rezultis diskutado. La prelego espereble estos presigata entute en Internacia Pedagogia Revuo. Oni tiam revenis al la afero de « Internacia minimuma vortaro por infanoj. »

F-ino NIXON klarigis ke la Edukada Komitato de Brita Esp. Asocio jam entreprenis la verkadon de legolibro bazita je minimuma internacia vortaro. Oni decidis starigi malgrandan internacian komitaton por pristudi la efikon de tiu ĉi libro kaj plu esplori la problemon.

S-ro ROOMIE esprimis dankon al Prof. Collinson pro lia lerta kaj oferema gvidado de la kunveno. —

Sekvis speciala kunsido de TAGE-anoj por pritrakti la problemojn de kreskigo de la anaro kaj pli efikaj servoj al la instruistaro. Oni akceptis nomojn por nova prezidanto de TAGE kaj por la starigota komitato, kiu studu la minimuman vortaron. Oni ankaŭ faris kelkajn rekomendojn kaj deziresprimojn al la TAGE-estraro kaj rezoluciojn al la Kongreso:

Proponoj al la Kongreso.

(La Ferma Kunsido de la 30-a akceptis ilin.)

1. Konstatante ke la praktika uzado de Esperanto inter lernejoj estas nia celo kaj ankaŭ la plej bona propagandilo, kaj ke la ĉefa rimedo por efektiviĝi tion estas aranĝi interlernejan vizitadon kaj libertempojn, la TAGE-Kunveno rekomendas **ke la Kongreso sendu gratulojn al la « Juna Vivo », interlerneja festo en Nederlando (kun almenaŭ 150 partoprenantoj), kaj ke IEL faru sian eblon instigi kaj subteni similajn aranĝojn en la estonteco.**

2. Konstatante ke la Instruista Movado ne estas sufiĉe forta, parte pro manko de celkonscia kunagado kaj organizado, la TAGE-Kunveno rekomendas **ke IEL elpensu planon por kunlabori kun TAGE celante speciale: 1. la starigon de instruistaj unuigoj laŭ la naciaj cirkonstancoj, kun laŭeble unu kotizo por TAGE kaj IEL; 2. pli efikajn servojn inter geinstruistoj kaj lernejoj.**

V. C. N i x o n , Sekr. de la Kunvenoj.



Internacia Scienca Asocio Esperantista

La 4-an de aŭgusto, dum la Londona Universala Kongreso, okazis la jara ĝenerala kunveno de I.S.A.E., la plej malnova el la sciencaj esperantistaj asocioj, ĉar ĝi estis fondita en 1906.

Pro foresto de la Prezidanto, D-ro Buiwid, kaj de la ĝenerala sekretario, inĝ. M. D. Dupuis (kaŭze de malsanoj), la ĉeestantaro elektis s-ron Fawcett prezidanto kaj s-ron Guillaume sekretario.

Diversaj temoj estis priparolataj, pri la konsisto de la Bulteno, la karaktero de la artikoloj, kaj la kosto de la kotizo (kiu entenas la prezon de la Bulteno). La tre malsamaj vivkostoj en multaj landoj igas tiun lastan problemon malfacile solvebla.

Fine kelkaj membroj de ISAE sciigis ke ili deziras helpon en sciencaj fakoj, pri kiuj ili interesiĝas.



La turisma Kunveno

Laŭ invito de la turista fako de la nederlanda Esperanto-Asocio LEEN, ĉeestis por Norvega Esp. Ligo s-ro A. Jenssen; Sveda Esp.-Federacio s-ro E. Malmgren; Esp.-Asocio en Ĉsl. Respubliko s-ro Baruch; Societo Franca p. Esp. s-ro Guillaume; Brita Esp. Asocio s-ro Wilkinson; Svisa Esp.-Asocio s-ro O. Walder; Centra Dana Esp. Ligo s-ro P. Justesen; LEEN s-ro Hans Bakker.

La nederlanda asocio proponis, ke ĉiu landa asocio anoncu pere de sia propra nacia Esperantogazeto senpage la aranĝojn de la turistaj fakoj de la aliaj naciaj societoj. La interkonsento do sin bazas sur la principo de reciproka servo.

Oni decidis provizore, ke ĉiu nacia turista fako povos aranĝi ferio-semajnon dum la monatoj julio-aŭgusto kun escepto de la tempo, en kiu okazos la universalaj kongresoj. Du aranĝoj ne okazos samtempe.

Hans B a k k e r, sekr. vojaĝoficejo LEEN.



Denaska Esperantistaro

Jen la unua blekado de infana asocio, kiu naskiĝis je kunveno en ĉi tiu Kongreso, la 2-an de aŭgusto 1938.

Kvankam infano, ĝi celas prizorgi infanojn. Jen ĝiaj anoncigitaj celoj:

a) edukigi generaciojn de dulingvaj infanoj, tiel ke ili havu Esperanton kiel eble plej egale kun la nacia lingvo;

b) plifaciligi la enkondukon de la infanoj en esperantistajn rondojn, por ilin familiarigi kun la Esperanta vivo kaj sento;

c) plifaciligi internacian kunfratiĝon per korespondado kaj reciprokaj vizitoj;

d) helpi publikigi taŭgajn libretojn por infanoj;

e) ĉiumaniere interesigi kaj kuraĝigi la infanojn, kaj tiel trakti pri ili, ke ili iĝu « laŭnaturaj esperantistoj ».

Ĝia membraro havas tri kategoriojn:

Individuaj Membroj: Tiuj kies gepatroj aŭ kuratoroj promesas, antaŭ ol la infano atingas lingvokomprenon, ke ili edukos ĝin kiel Esperanto-parolanton.

Asociaj Membroj: Tiuj, kiuj jam atingis komprenpovon sed ankoraŭ estas infanoj laŭleĝe, kaj kiuj, aŭ propravole, aŭ pere de siaj gepatroj aŭ kuratoroj, promesas bone esperantigi.

Helpmembroj: Tiuj, kiuj subtenas la asocion per helpo al ĝia kaso.

Ni esperas ke multaj aliĝos al la lasta, laŭ bonvolo kotizanta, kategorio, ĉar la kotizo de duono da svisa franko por la infanoj ne povas pagi la necesajn pres- kaj poŝt-elspezojn, precipe en la unuaj jaroj.

Ni esperas trovi reprezentantojn ĉiuloke, — prefere virinojn, ĉar ĉi tiuj pli taŭge kaj efektive rilatados kun familioj kie estas infanoj. Oni proponas ke la reprezentantoj portu oficiale la familieran titolon « Onklino de Denaska Esperantistaro ». Ili varbos gepatrojn kaj la pli aĝajn infanojn, kaj kuraĝigos kaj instigos ĉiujn esperantistiĝi, kaj poste resti fidelaj.

La kunveno decidis ke, por la unua jaro, la Estraro kaj oficistoj: la Statuto kaj Regularoj estu konsiderataj kiel provizoraj. Per kaj laŭ ĉi tiuj ĝi laboros ĝis la 31-a Kongreso, kiam ĉiu afero rekonideriĝos kaj definitive fiksiĝos.

Kiel Prezidanton por la unua jaro oni elektis s-ron Robert Robertson (« Pra-onklo Robert »); kiel Viv-prezidanton, s-ron Alfred Mithey (Paris) kaj s-ron Krolenbaum (Londono); kiel Ĝeneralan Sekretarion s-inon J. W. Neal, la iniciatinton de la projekto (« Pra-Onklino Rahel »); Adreso: 48 Elvendon Road, London N. 13. Kiel Estraranoj kun la jam cititaj estas elektitaj s-ro Paul Blaise (Londono), s-ro Tiberio Morariu (Svedujo) kaj s-ro Elek Tolnai (Budapeŝto).

Por certigi la veran internaciecon de D.E. la Statuto postulas ke la ĉiujara Kunveno, ĉiun trian jaron, decidu ĉu aŭ ne oni ŝanĝu la sidejon de la Centra Oficejo.

Ni treege deziras sciigi, pere de la Ĝenerala Sekretariino aŭ iu Estrarano, pri la nomoj kaj adresoj de taŭgaj « Onklinoj » en ĉiu regiono de la mondo, ĉar ni firme kredas ke nia nova asocio, per la laboro de tiuj Onklinoj, povos havi bonegan efikon je la estonteco de nia movado.

Do, helpu nin ĉiuj !

Robert Robertson kaj Rachel S. Neal, fak-kunvenestroj.



Baha'a Kunveno

Baha'a Kunveno okazis lundon, la 1an de aŭgusto, je 14.30 h. Ĉeestis 47 kongresanoj. Salutis la ĉeestantaron f-ino Agnes Lavender (Manchester), kiu prezidis kaj kiu petis s-ron Walter Wilkins deĵori kiel sekretario por la kunveno.

Pro la bedaŭrinda neĉeesto de f-ino Lidia Zamenhof, kiu ankoraŭ gvidas Cseh-kursojn en Usono, kaj de s-ro Vuk Echtner (Prago), f-ino Baxter legis la sendaĵon de s-ro Echtner, kaj s-ino Knight tiun de f-ino Zamenhof. La unua temis pri « La Vero venkas », devizo kiun metis Prezidinto Masaryk en la ĉeĥoslovakana emblemon kaj kiu nin kuraĝigas en nia porpaca laboro. La prelego de f-ino Zamenhof skizis la kontentigan animliberecon kiun atingas Dio-

La brita gazetaro kaj la Kongreso

Dum la 30-a Universala Kongreso de Esperanto estis eble konstati, ke la gazetoj bone raportis pri ni, sed estis ankoraŭ tro frue por fari bilancon. Niaj kongresoj servas du celojn: unue esti festo labora kaj socia, kaj due manifestacii nian lingvon kaj movadon antaŭ la ekstera mondo. Pri la unua flanko jam aperis raportoj diversloke, kaj la partoprenintoj mem povas atesti.

Nun, post kiam malaperis de sur la scenejo la restaĵoj de la kongreso kaj ĉiuj rolintoj hejmenvenis, estas eble fari kontrolon pri la efiko de la manifestacio kaj taksu la propagandon. De la Gazeteltranĉa Agentejo venis amaso da eltranĉaĵoj el ĵurnaloj de ĉiu parto de la britaj insuloj, kaj vere surprize bonaj ili estas. La ĉefaj naciaj tagĵurnaloj sen escepto presigis bonajn notojn, kaj kelkaj tre laŭdis nian aferon, esprimante la senton, ke la celo de nia movado estas tia, kian la mondo devus aprobi. Aliaj disponigis bonan lokon al objektivaj kaj favoraj ĵurnalistaj artikoloj. Kompreneble, unuj iomete skeptikis, esprimante la kredon, ke la angla lingvo estas jam internacia — sed eĉ ĉe tiaj ĵurnaloj la penso estis kvazaŭ nure « enĵetita », kaj en aliaj partoj de la sama gazeto aŭ en sekvintaj numeroj oni legas favoran komenton !

Taksante la sintenon tute objekte, oni devas diri, ke la gazetoj estis vere tre komprene favoraj, kaj neniel mokemaj.

Estas neeble doni precizajn ciferojn pri la raportado, sed, inkluzive de la antaŭkongresaj informoj, aperis notoj aŭ artikoloj pri la Kongreso almenaŭ 600-foje en la brita gazetaro.

Al kio atribui ĉi tiun sukceson? Estas diversaj kaŭzoj, kiuj efikis helpe, sed sendube estas unu grava faktoro — la Gazeta Informservo de la Brita Esperantista Asocio.

Komencante de januaro ĉi-jare BEA regule sendis monatan informbultenon al ĉirkaŭ 150 ĵurnaloj, kun sciigoj pri la lastatempaj sukcesoj de nia movado tra la mondo, kaj antaŭinformoj pri la kongreso. Sekve, la gazetaro estis bone antaŭinformita pri nia afero, kaj kun intereso rilatis al ĝi.

E. D. Durrant,

Hon. Sekretario, Propaganda Komitato de BEA.

fidanto, kiel perfekte ekzemplis Abdul Baha. F-ino Evelyn Baxter (Londono) prelegis pri « La Nova Tago — Tago de Dio », en kiu ŝi prezentis la Baha'ajn instruojn.

La Londonaj Baha'anoj invitis la ĉeestantojn temangi ĉe la Baha'a Centro, 46 Bloomsbury St., kaj post dankesprimado al la ĉeestantaro, la verkintoj kaj legintoj oni fermis la kunsidon.

A. E. Baxter, sekr. por Esperanto.

Internacia Esperanto - Ligo

Centra Oficejo: Heronsgate, Rickmansworth, (Herts.), Anglujo.

Oficiala Informilo

N-ro 87 1-an de Septembro 1938

NOVAJ DELEGITOJ:

Britujo
Alford (Lincs.). — D: P.T. Keily, «Carmoyle», Chantry Road.
London. — FD. (Arkitekturo): E.J. White, 59, Inderwick Road, London N 8.

Bulgarujo
Musina (Tirnovo). — D: P. Dimitrov Popov. FD. (komercio): La D.
Nova Mahla (Gabrovo). — D: M.D. Metev.
Obretenik (Bela). — D: S-ino C.G. Jotova. FD. (Instruistaj aferoj): La D.
Sevlievo. — D: St. Angelov, presejo «Grofika».

Francujo
Vienne (Isere). — D: P. Uline, 16, Rue Victor Hugo.
Vence (Alpes-Maritimes). — D: S-ino M. Roubaud, 1, Place Thiers.

Hindoĉinujo
Hanoi (Tonkin). — VD: Nguyễn Xuân My, 68, Rue du Coton.
Pakse (Laos). — D: G. Rifaud.

Nov-Zelando
Waimate (South Canterbury). — D: F-ino L. Morrison, King Street.

Polujo
Warszawa. — FD. (Turismo, vegetaranismo, kontraŭalkoholismo): S-ino L. Tazbirowa, Hoza 74/5, Warszawa I. Tel. 95951.

Portugalujo
Lisboa (Estremadura). — FD (Poŝto): Alvaro Pontes, Rua D. Estefânia, 84-2, esq.

SANGOJ:

Belgujo
Mechelen. — Provizore ne estas D.
Derby. — FD (Biciklado): Nova adreso: c/o 115, Station Road, Draycott, Derbyshire.
Usono
Syracuse (New York). — D: Nova adreso: 748, N. Salina St.

KVAKERA ESPERANTISTA SOCIETO.

Nova adreso: «Green Maze», Upper Manor Road, Godalming, Surrey, Anglujo.

MONATA STATISTIKO.

Membraro.

Jen la stato de la pagitaj kotizoj ĝis la fino de Aŭgusto 1938, kaj ankaŭ, por komparo, ĝis la fino de Aŭgusto, 1937:

	Aŭg. 1938	Aŭg. 1937
Asociaj Membroj	7155	7812
Individuaj Membroj:		
MJ	1269	1071
MA	994	974
MAH	301	243
MS	131	133
Patronoj	9	13
DM	73	74
HM	30	31
	2807	2539
	9962	10351

Korespondantoj.

	dum Julio, 1938
Centra Oficejo (sen la gazetoj)	1101
Ricevitaj	1085
Senditaj	2186

	dum Aŭg. 1938
Centra Oficejo (sen la gazetoj)	494
Ricevitaj	772
Senditaj	1266

C. C. GOLDSMITH,
 Ĝenerala Sekretario.



INTERNACIA KONKURSO 1938

Stato je la 31-a de Aŭgusto, 1938.

	Poentoj		
	1937	1938	%
1. Svislando	137	413	301.5
2. Bulgarujo	92	266	289.1
3. Jugoslavujo	257	669	260.3
4. Polujo	318	631	198.4
5. Latvujo	55	101	183.6
6. Finnlando	61	102	167.2
7. Litovujo	135	169	125.2
8. Kanado	74	79	106.7
9. Aŭstralio	429	454	105.8
10. Norvegujo	792	810	102.3
11. Belgujo	1722	1714	99.5
12. Britujo	6483	6352	97.8
13. Sud-Ameriko	851	802	94.2
14. Nov-Zelando	265	247	93.2
15. Portugalujo	317	288	90.8
16. Usono	1513	1369	90.5
17. Nederlando	2837	2553	90.0
18. Francujo	5907	5249	88.8
19. Italujo	636	561	88.2
20. Hungarujo	619	524	84.6
21. Svedujo	3024	2449	80.9
22. Ĉeĥoslovakujo	2449	1800	73.5
23. Afriko	137	99	72.3
24. Danujo	1118	745	66.6
25. Rumanujo	50	27	54.0
26. Azio	1321	548	41.5
27. Aŭstrujo	789	311	38.9
28. Grekujo	137	—	—
	32525	29332	% 90.2



Oficiala Informilo

N-ro 88 8-an de Septembro 1938

NOVAJ DELEGITOJ:

Danujo
Haslev (Sjælland). — D: B. J. Sørensen, Nørregade 4.

Nederlando
Huizum (Friesland). — FD (radio kaj frisa lingvo): S.S. De Jong, Frans Halsstraat, 41.
Scheveningen (Zuid Holland). — VD: Teo Jung, Harstenhoekweg 223.

Nov-Zelando
Masterton. — FD (P.T.T.): W. H. King, Clerical Branch, Post Office.

Portugalujo
Lisboa (Estremadura). — FD: (aŭtomobilaj aferoj): J. Antunes, Rua dos Fanqueiros 106, 4^a d^a.

Svislando
Bern. — FD (fervojistaj aferoj): J. Perlet, Bollwerk 27.

Frauenfeld (Thurgau). — D: E. Brenner, Wiesenstrasse 1.

Oiten. — D: F. Marsänger, Martin Distelstrasse 49.

Thun-Uetendorf. — FD (medicino): D-ro O. Huber, Uetendorf-Thun.

Wattwill (St. Gallen). — D: W. Hartmann, Schomattenstrasse.

SANGOJ:

Latvujo
Peranto: Nova adreso: Ernests Erhards, Jūrmals iela ŭo. 11-2, Liepaja.

Nov-Zelando
Wellington. — FD (P.T.T.): Translokiĝis al Masterton.

Usono
San Antonio (Texas). — D: Pro la morto de Pastro J. H. Fazel provizore ne estas D.

NOVA PATRONO:

10. J. R. Grocott, Blackburn, Anglujo.

MEMBRO-SUBTENANTO:

132. Arnfinn Jensson, Stabekk, Norvegujo.

Al ĉi tiuj samideanoj ni ŝuldas sinceran dankon.

C. C. GOLDSMITH,
 Ĝenerala Sekretario.



Oficiala Informilo

N-ro 89. 15an de Septembro 1938

NOVAJ DELEGITOJ.

Britujo.
Caistor (Lincolnshire). — D: A. W. Leftwich, The Causeway.

Glasgow (Skotlando). — FD (biciklado): N.H.C. Macpherson, 163, St. Vincent St., Glasgow, C2.

Godalming (Surrey). — D: J. T. Harrod, Green Maze.

Melton Mowbray (Leicestershire). — D: F-ino N. Wilford, Long Clawson Hall.

Bulgarujo.
Trevna. — VD: Nikola St. Stojećev.
Väbel (Nikopol). — D: Ivan Jordanov.
Varna. — FD (tekniko): M. G. Daskalov, Str. Malamir 19.

Hungarujo.
Retköz (Szabolcs megye). — FD (bienkontrolado): Imre K. Kovárcz.
Vecses (Pest-Megye). — D: G. V. Szöllösy, Tamas ucca 8/A.
 FD (Universitataj aferoj, Hungara literaturo kaj historio): La D.

Svedujo.
Boden (Norrbotten). — D: F-ino E. Nyberg, Fagerås 116.
Lindesberg (Vestmanland). — D: K. L. Andrén.



SANGOJ.

Hungarujo.
Budapest. — FD (komercio): translokiĝis al Retköz.

Kenya Kolonio.
Dabida. — La Delegito estas en Anglujo ĝis Julio 1939.

Svedujo.
Nynäshamn. — Provizore ne estas D.
Svennevad. — D: translokiĝis al Lindesberg.



NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIO.
 Nova adreso: S-ro W. H. King, Clerical Branch, Post Office, Masterton.
 C. C. GOLDSMITH,
 Ĝenerala Sekretario.

UNUECO ESTAS FORTO

Esperanto urĝe bezonata

Interparolo sub « kvar » okuloj : Runciman, Henlein kaj S-ro Aparato.

Dana samideano A. Th. sendis al ni numeron de « Politiken », de 19.8.1938, kun artikolo kiu havas la titolon : « Interparolo sub kvar okuloj — sed oni devis venigi interpretiston ».

El ĉi tiu artikolo ni ĉerpas la jenajn rimarkojn :

... Lord Runciman kaj Henlein renkontiĝis ĉe lunĉo kiun donis la regno-germana princo Max Egon Hohenlohe en sia palaco Rotenhaus ĉe Görkau en Erzgebirge... La kunveno estis severe sekreta... Post la manĝo la societo faris promenadon, dum kiu oni havis la okazon fari politikajn interparolojn... Je 15.30 h. inter Runciman kaj Henlein okazis kunveno en la palaco; tamen estis necese venigi interpretiston, ĉar Henlein nur tre malbone scipovas la anglan lingvon, malgraŭ siaj ripetitaj vizitoj al Anglujo...

★

Chamberlain kaj Hitler ne kapablis rekte paroli unu al la alia.

La franca korespondanto de « Daily Telegraph », konservativa angla ĵurnalo, raportis al sia redakcio merkredon vespere, la 14.9. (la ĵurnalo publikigis tion la 15.9.):

« La decido de s-ro Chamberlain, iri al Berchtesgaden morgaŭ, estas la rekta rezulto de diskuto kun la franca registaro, sed la formo de tio ne sugestis ke brita ĉefministro mem estos la persono por rekte kontakti kun la Führer... Hieraaŭ posttagmeze s-ro Chamberlain kaj s-ro Daladier, la franca ĉefministro, interparolis telefone, kaj Kavaliro Eric Phipps, brita ambasadoro en Parizo, interpretis. »

La sama ĵurnalo, en alia parto, parolante pri la flugvizito de s-ro Chamberlain al Germanujo, diras :

« La ĉefministro ne povas konduki diskutadon en la germana lingvo, kaj s-ro Hitler simile ne povas konversacii en la angla lingvo kun facileco. La interŝanĝo de vidpunktoj okazos pere de interpretistoj, kaj supozeble s-ro Strang (akompananto de s-ro Chamberlain) plenumos tiun oficon... S-ro Strang prenis la notojn de la longaj konversacioj inter s-ro Hitler kaj Kavaliro John Simon kaj s-ro Eden dum ilia vizito al Berlino en 1935. »

Post la vizito oni legis ke « Post la teo Hitler kaj Chamberlain havis konferencon, kiu daŭris 2 1/2 horojn. Nur la interpretisto, D-ro Schmidt, ĉeestis krome.

La pens-interŝanĝo mem, se oni deprenus la tempon necesan por la tradukado, daŭris iom pli ol unu horon. » (« Haagsche Courant », 16.9.1938.)

Tradukistoj kaj interpretistoj estas gravaj kaj utilaj homoj, kaj oni bezonas ilin ankoraŭ longan tempon post la enkonduko de Esperanto, — fakte oni bezonas tradukistojn en ĉiuj tempoj, ĉar ĉiam ekzistos naciaj lingvoj, krom la internacia. Sed kiam temas pri tiel gravegaj interparoloj, de kiuj dependos milito aŭ paco, la vivo aŭ morto de milionoj, kaj eventuale la pereco de Eŭropo, estas tamen altgrade bedaŭrinde, ke Chamberlain kaj Hitler ne kapablas rekte paroli unu al la alia. Pri la tempo, kiu perdiĝas per la interpretado, kaj per la ĝustigo de eventualaj miskomprenoj, ni eĉ ne insistu.

★

« Se mi nur parolus fremdajn lingvojn... »

« Mi povus la diktatorojn bonege interkonsentigi, se mi nur parolus fremdajn lingvojn... » Tiu esprimon faris, laŭ « De Telegraaf » (Amsterdam, numero 17265 de 8.9.1938), la brita laborpartiestro kaj pacifisto George Lansbury, post reveno de sia rondvojaĝo en Orienta Eŭropo kaj en Balkano.

Eble li estas prava.

★

Perditaj horoj — miskomprenitaj esprimoj.

En la dana ĉefurbo Kóbenhavn (Kopenhago) okazis dum julio tritaga kongreso de International Federation of Teachers Associations (Internacia Federacio de Instruistaj Asocioj). Laŭ raporto en dana instruista gazeto « Folkesholm » (28.7. kaj 4.8.1938) la oficialaj lingvoj de la kongreso estis : germana, angla, franca kaj dana. En la gazetó oni legas: « La traktadoj okupas ja tempon, kiam ĉio devas esti ripetata anglen, germanen kaj francen. » Ho jes, longa afero !

La delegitoj diskutis i. a. la eniron de la lernantoj en superan instruadon. Pri tio oni legas : « La problemo havas multajn flankojn... Kaj la traktado estis speciale malfacila, ĉar la vortoj en la tri lingvoj, en kiuj la rezolucioj formiĝis, ne ĉiam estas identaj. » Rimarkindaj frazoj !

Do eĉ bona traduko (longdaŭra !) ne sufiĉas. Jen nova okazo, kiu pravas ke internacia helplingvo estas dezirinda kaj bezonata.

Sendube I.F.T.A. multmaniere povus utiligi Esperanton. La raporto mencias multajn internaciajn entreprenojn, pri kiuj la Federacio interesiĝas: kongresoj, kursoj, komunaj vojaĝoj, studvojaĝoj, interŝanĝo de instruistoj kaj instruist-aspirantoj, korespondado de gelemantoj. Ĉio trans la limojn. Kiel valorega estus Esperanto en tiaj rilatoj !

Kiel tute malsame estas ĉe ni, esperantistoj ! Kiel facile ni interkompreniĝas en niaj kongresoj ! Tiel ke fine ankaŭ la publiko komencas senti la diferencon. Jen kion skribis pri nia 30-a la angla « Children's Newspaper » (ampleksa ĉiusemajna ilustrita revuo por gejunuloj), kiu dediĉis al la Londona Kongreso detalan artikolon sur la ĉefa paĝo de sia numero de 20.8. :

Ĝi estis pli vigla, pli amika kongreso ol ĝenerale. Tie ne estis ŝtultaj flikaĵoj pro ĝenaj tradukoj. La kongresanoj, naskitaj en ĉiuj partoj de la mondo, ĉiuj parolis la saman lingvon. Ili ne lamparolis ĝin kiel la pli multaj el ni parolas fremdan lingvon akiritan en lernejo ; ili diskutis en ĝi, ŝercis en ĝi, kaj liveris en ĝi viglajn kaj pasiajn paroladojn, kvazaŭ ĝi estus ilia propra lingvo...

Ke ĉiuj povu veni al niaj kongresoj kaj konvinkiĝi per propraj okuloj pri la avantaĝoj, kiujn al ni, esperantistoj, prezentas nia lingvo ! Ili ne plu mokus pri ni sed sincere envidius nin, kaj ili ja ne hezitus utiligi tiujn samajn avantaĝojn por si mem kaj por la tuta mondo.

La kontraŭuloj asertas

ke la esperantistoj estas krimuloj kontraŭ la nacia lingvo, kaj sekve ankaŭ kontraŭ la patrujo. La malo estas vera. Unu el la ĉefaj motivoj de l' esperantistoj — precipe de tiuj el malgrandaj nacioj — por la propagando de la helplingva ideo estas ke Esperanto en lingva rilato donas al la propra nacio egalan rajton kun aliaj nacioj, kaj ke Esperanto protektas la propran nacian lingvon kontraŭ fremdaj influoj. (Eĉ la germana lingvo ankoraŭ ne havas tute egalan rajton al la angla kaj franca; germanaj neesperantistoj en sia rilato kun alilandanoj kutime uzas ne la propran, germanan lingvon sed la lingvon de la aliaj, kaj tiel eĉ plej naciemaj germanoj senkonscie servas al la pli grandigo de la influo de l' aliaj lingvoj, kaj ne de la propra! — el kio rezultas ke esperantistoj en lingva rilato estas pli patriotaj ol la plej patriotaj naciistoj kiuj Esperanton rifuzas.)

La malĝustaj tradukoj

La Pariza gazeto « Le Matin » (tiel informas nin s-ro Rollet de l'Isle) ĵus publikigis la jenan artikolon :

... La malĝustaj tradukoj estas pli dangeraj ol la malveraj novaĵoj... Tion pruvas la t. n. ĝustigado de la deklaro de Prezidanto Roosevelt.

Li tion diris, laŭ telegramo de « United Press » al « Herald Tribune » :

— Any moral lignment of the United States with European nations to form a « Stop Hitler » bloc was disclaimed by President Roosevelt in a special press conference called in Hyde Park last night.

La ĝusta traduko en franca lingvo estas :

— Tout alignement moral des Etats-Unis avec les nations européennes pour former un bloc « Stop Hitler » (arrêtez Hitler) a été dénié par le Président Roosevelt dans une conférence spéciale de presse convoquée à Hyde Park l'autre nuit. ¹⁾

Kaj la telegramo aldonas frazon, kies franca traduko estas :

— Quoique confirmant sa position contre tout pays agresseur, le président a déclaré que certaines interprétations de journaux de la politique étrangère américaine étaient cent pour cent fausses. ²⁾

Kaj tiuj tekstoj fariĝis, en telegramo de la franca Havas-ofico de New-York:

— A la question: « Les Etats-Unis sont-ils moralement liés aux démocraties de l'Europe dans le mouvement qui tend à arrêter Hitler? » le président Roosevelt a répondu en substance:

— Inclure les Etats-Unis dans un front France-Grande Bretagne contre Hitler est une interprétation cent pour cent fautive de chroniqueurs politiques. ³⁾

Ĉu necesas montri la grandajn diferencojn de ambaŭ telegramoj? La Prezidanto ne parolis pri *Fronto Francujo-Grandbritujo*, li parolis pri «morala samviciĝo» kune kun la eŭropaj nacioj por formi blokon *Stop Hitler*. Tio estas pli ol nuanco: estas aliaj vortoj, alia penso; ŝajne li parolis malafable pri Francujo kaj Britujo, kiujn li ne nomis. Oni paroligis lin pri brita-franca bloko, kio estas sensencaĵo. Oni diris ke li aplikis tiun esprimon « centprocenta malvereco » al tiu bloko, dum li aplikis ĝin al la klarigoj de la amerikaj gazetoj...

¹⁾ Ĉiu morala samviciĝo de la Unuiĝintaj Ŝtatoj kune kun la eŭropaj nacioj por formi blokon « Stop Hitler » estis neigita de la Prezidanto Roosevelt en speciala kunsido por la gazetaro, okazinta ĉe Hyde Park la antaŭan nokton.

²⁾ Kvankam konfirmante sian pozicion kontraŭ ĉiu atakanta lando, la Prezidanto deklaris, ke kelkaj klarigoj de gazetoj pri la eksterlanda amerika politiko estis centprocente malveraj.

³⁾ Al la demando: « Ĉu la Unuiĝintaj Ŝtatoj estas morale alligitaj al la eŭropaj demokratioj en la movado, kiu celas haltigi Hitler-on? » la Prezidanto respondis esence: Enmeti la Unuiĝintajn Ŝtatojn en fronton Francujo-Britujo kontraŭ Hitler, estas klarigo centprocente malĝusta de politikaj gazetistoj.

F-ino Amy Johnson favoras Esperanton

Eldiro de mondrekorda aviadistino

En ĉiuj landoj de la mondo la nomo de f-ino Amy Johnson estas fame konata inter la aviadaj rondoj kaj la ĝenerala publiko pro ŝiaj rekordaj solulflugoj de Anglujo al Aŭstralio, Hindujo, Japanujo kaj Sudafriko.

En letero al la verkinto de ĉi tiu noto ŝi diris pri Esperanto: « Mi kredas, ke ĝi estus ekstreme utila. Estus granda helpo, ekzemple, se ĉiuj aviadaj terminoj estus normigitaj kaj komprenataj egale en ĉiuj landoj. La flugado povas venki la plej multajn barilojn, sed ankoraŭ devas cedi al tiu de lingvo; kaj tio povas esti tre ĉagrena barilo, kiel mi mem nur tro ofte spertis. »

Piednote estu dirite, ke la provizora ellaborado de teknika aviada terminaro estas en farado de s-ro Lewin kunlabore kun aliaj membroj de la B.E.A. kaj kelkaj eksterlandaj samfakuloj. Ni jam ricevis la nomojn kaj adresojn de kelkaj okupitoj en la aviaĵa fako — sed se estas aliaj, kiuj ne skribis, ni petas, ke ili informu nin.

E. D. Durrant,

Esperanto sur Ĉeĥoslovakaj poŝtkartoj

Ni jam anoncis antaŭ unu jaro, ke la ĉeĥoslovaka poŝto aperigis du poŝtkartojn kun teksto ĉeĥa-esperantlingva. Ambaŭ poŝtkartoj estis baldaŭ elĉerpitaj, kaj la poŝta ministerio plenumis proponon de la Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko kaj eldonis pluajn kvar poŝtkartojn kun surprisita 50-helera poŝtmarko. La bildoj kaj tekstoj denove havas esperantistajn motivojn. La tekstoj estas en lingvoj ĉeĥa kaj esperanta. Jen ili sekvas laŭ numeroj kaj tekstoj:

N-ro 71. Láznê Bêlohrad: Aleo de D-ro L. L. Zamenhof.

N-ro 72. Láznê Bêlohrad: Esperantista libertempejo.

N-ro 123. Praha: Esperantista centro en koro de Eŭropo.

N-ro 206. Brno: Urbo de Verda Stacio kun regula esp. radiosendo.

Precipe grava laŭ la esperantista vidmaniero estas la fakto, ke sur oficialaj poŝtkartoj oni uzas Esperanto-motivojn por turisma propagando.

Librovendejo de Esp.-Asocio en Ĉ. S.R., Truhlarska 16, Praha II, liveras al interesuloj ĉiujn kvar poŝtkartojn neuzitajn en koverto filateliste afrankita por 2 respond-kuponoj, en registrita letero por 3 resp.-kup.

La Brazila Registraro kaj Esperanto

La Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko, kiu celas la unuigon de la brazilaj statistikoj (antaŭ nelonge kreita de D-ro Getulio Vargas, nuna prezidanto de la Respubliko, de kiu ĝi senpene dependas, kaj kies prezidanto estas Ambasadoro D-ro J. C. de Macedo Soares, eksministro por Eksterlandaj Aferoj), kunveninte ĉe ĝenerala kunsido, unuanime aprobis la jenan deziresprimon, prezentitan de ĝia ĝenerala sekretario, D-ro Mario Teixeira de Freitas:

Paragrafo 1. Estas rekomendite, ke tiuj kiam estos eble, la ĉefaj statistikaj publikigaĵoj, eldonotaj de la Unuiĝo kaj ankaŭ de la Ŝtatoj, enhavu, kiel oni juĝos plej taŭge, la necesajn elementojn, por ke ili povu esti legataj en Esperanto.

Paragrafo 2. Estas dezirinde, ke la brazilaj statistikaj departementoj alprenu Esperanton por sia korespondado eksterlanden.

Okaze de la solena ferma kunsido de la Naciaj Konsilantaroj de Geografio kaj Statistiko, kiun prezidis D-ro Macedo Soares, sidis ĉe la prezidanteca tablo, kune kun la oficialaj reprezentantoj de la Ministroj kaj de la Ĉefurbestro, s-ro A. Couto Fernandes, prezidanto de

Brazilo Ligo Esperantista. Post la legado de la raportoj kaj la oficialaj paroladoj tiu ĉi faris dankan paroladeton, kiu finiĝis per esperantaj vortoj danke al D-ro Teixeira de Freitas, tre fervora esperantisto.

Al la ĉeestantoj oni disdonis, krom ekz. de « Primeiro Manual de Esperanto » kaj aliaj esperantaĵoj, la tiam aperintan Statistikan Resumeton, kiun eldonis la Instituto de Geografio kaj Statistiko. Tiu ĉi eldonaĵo, kiu estis kompostita kaj presita antaŭ la aprobo de la supra deziresprimo, estas fakto, kiu pruvas, ke tiu ĉi ne restos surpapera, kiel okazas al preskaŭ ĉiuj unuanime aprobitaj deziresprimoj.

D-ro Leite de Castro, sekretario de la Nacia Konsilantaro de Geografio, deklaris al la prezidanto de B.L.E., ke la « Brazila Revuo de Geografio », ĝia oficiala organo, baldaŭ aperonta, enhavos esperantan resumeton de siaj artikoloj.

Jen tre grava venko de Esperanto ĉe la registaraj rondoj!

Bonvolu peti ekzempleron de la « Statistika Resumeto », de : Instituto Brasileiro de Geografia e Estatística, Praça Mauá, 7 - 11-o andar, Rio-de-Janeiro, Brazilo.

En la urbo de Hamleto

en Elsinoro (Helsingör), Danlando.

Tutan jaron laboris energie s-ro instruisto Friis en Aabyhöj kaj nia karmemora koleginino, f-ino Saxl, por bone prepari la internaciajn kursojn de lasta somero.

La unua etapo de la kurso okazis inter la 16.-24.7. kun 91 partoprenantoj el Anglujo, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Francujo, Germanujo, Nederlando, Norvegujo, Polujo, Rumanio kaj Svedlando. La elementan kurson gvidis s-ro Hagen (Germ.), la daŭrigan s-ro Friis (Dan.), la perfektigan kaj la seminarion f-ino Saxl (Ĉeĥosl.); pri historio de l' Esperantomovado prelegis f-ino Noll (Dan.) kaj pri la Esperanta literaturo s-ro Morariu (Rum).

Por la dua parto, la internaciaj feriaj tagoj dum 15.25.8, alvenis 49 gastoj el Ameriko, Anglujo, Belgujo, Danlando, Francujo, Hungarujo, Nederlando, Rumanio, Svedlando. Dum la malfermo s-ro Friis dediĉis dankajn vortojn al f-ino Saxl, kiu intertempe mortis en Londono. La gvidanto sciigis, ke la taskon pri seminario instruado laŭ la Cseh-metodo nun transprenis T. Morariu. La sama faris prelegojn pri la stelo-para de l' Esperanta literaturo: Baghy kaj Kalocsay, kaj pri «Esperanto en la militkaptejoj». Estis amuze aŭdi la rumanan propagandiston kiel akran atakanton de nia lingvo dum diskutado por kaj kontraŭ la internacia helplingvo. F-ino Noll energie refutis la kontraŭajn argumentojn dum tiu ĉi «interbatalo», kies celo estis liveri helpilojn al la kursanoj ĉe la hejma propagando.

Tre detalan kaj ege utilan konsilaron ni ricevis el la prelegaro de s-ro Teo Jung: «Kiel defendi Esperanton?» Je nia bedaŭro, la aŭtoro estis malhelpita persone ĉeesti en Elsinoro, tial s-ro Friis laŭtlegis la interesan prelegaron. Oni esprimis la deziron ke la valora konsilaro aperu ankaŭ en libra formo.

Memorindan prelegon faris la rektoro de la Internacia Altlernejo, s-ro Manniche, skizante al ni la devenan historion kaj la celon de la instituto: donante okazon al senpera kontakto internacia, eduki la diverslandanojn al interpopola respekto kaj amo.

Brilan akcepton aranĝis por ni niaj svedaj amikoj en Helsingborgo. Urbestro Laurin bonvenigis nin en Esperanto, kaj muzea intendanto D-ro Mortensson ĉe la ŝtuparo de kastelturo «Kerno» donis detalojn pri la historio de la kastelo kaj urbo. Longe ni memoros artajn kantojn de la sveda alaŭdo f-ino Maud Ekberg en la moderna, belaspekta Koncerta Domo. Vespere okazis amika festo en hotelo «Continental» por ĉ. 150 personoj, en flagornamita salono.

Pri ambaŭ kursaranĝoj s-ro Möller (el Kopenhago) faris bonegan filmon (daŭro 30 minutoj). Komence de oktobro tiu filmo ekmarŝos tra Esperantujo, unue al Anglujo, kie s-ino Major afable promesis vigle varbi por niaj kursoj. Ĉiuj kluboj utiligu la okazon por montri ĉi tiun filmon, kun Esperanto-teksto, kiam la landa organizo, aŭ alia reprezentanto proponos ĝin!

Multaj nunjaraj kursanoj promesis reveni venontjare, kiam la kurso daŭros kvar semajnojn: de 17.7. ĝis 14.8. Ni tuktore deziras, ke ĉiu samideano almenaŭ unufoje en sia vivo ĝuu tiom belegan kaj vere esperantan ferion en Helsingör!

Somera kunveno en Ry

La someraj kunvenoj en Danlando jam estas tradiciaj en la Esperanta mondo. Nunjare 184 eksterlandanoj festis kaj laboris kune kun 2-300 danaj geesperantistoj. Montriĝas pli kaj pli, ke ges-roj Grönborg havas la plej altajn kvalitojn lerte organizadi kaj gvidadi. Prelegoj, lecionoj, ekskursoj, multspecaj distroj kaj (ni ja estis en Danlando!) multaj manĝoj tre varie plenigis la programon ĉiutage.

La prelegistoj ne paroladis pri kaj pro Esperanto, sed per Esperanto pri la urĝaj temoj de nia tempo. Estas bone, ke Esperanto komencas ludi sian naturan rolon. La lecionoj kolektis la lernantojn en tri diversajn kursojn. En komenca kurso s-ino Weide montris sian rimarkindan lertecon Cseh-instruistinan; s-roj Jensen, Toustrup kaj Grönborg laŭ la lernolibro de Seppik-Malmgren sprite faris daŭrigan laboron; en perfektiga kurso regis lernemo kaj bonhumoro en la ĉeesto de s-ro Weide. Por la

lasta kurso estis farita ega antaŭlaboro, ĉiu kursano ricevis la kursmaterialon en sia hejma lingvo.

La naturo malavare benis Ry kaj la ĉirkaŭaĵon. Dum boato- kaj aŭto-ekskursoj la danoj fiere montris la perlon de sia lando. La veteridino komprenis la valoron de la Ry-kunveno kaj sendis por ĉiuj tagoj brilan sunveteron.

Dimanĉon, la 7-an de aŭgusto, la festo atingis sian kulminon. El tuta Jutlando kaj la danaj insuloj alvenis grandnombra gastaro. En tiu tago preskaŭ 400 ĉeestis. La riĉenhava tago komenciĝis per diservo en la preĝejo de Ry; nia samideano Uffe Hansen predikis pri la vivinecesa lumo. Estis la unua tutesperanta diservo en Danlando. Samvespere la dana Radio komunikis pri la granda kunveno kaj la (por Danlando) sensacia diservo.

Posttagmeze je la tria, oficiala festo kunvenigis ĉiujn en la granda festsalono de la Altlernejo. Anoj de 12 nacioj per siaj prezentaĵoj ĝojigis la esperantistojn kaj mirigis la ĵurnalistojn. Ĉi-lastaj kelkfoje ankoraŭ havas strangan opinion pri Esperanto.

La gazetaro ĉiutage tre detale raportis per siaj senditaj ĵurnalistoj pri la okazaĵoj. Ŝajnas, kvazaŭ nun la glacio rompiĝis, kiu ĝis nun ĉirkaŭis certan parton de la dana gazetaro. Ĉe la sportaj prezentaĵoj vespere la absoluta taŭgeco de Esperanto kiel sporta lingvo pruviĝis. La diligenta laboro de s-ro instr. Dybkaer kune kun liaj gimnastikuloj el la diversaj nacioj rikoltis egan aplaŭdon. Al liaj klaraj komandoj (en fundamenta Esperanto) sekvis la precizaj movoj de la gimnastikantoj.

Mardon la finfesto lastfoje plenkolektis a multkoloran familion. La ondoj de l' entuziasmo plaŭdis alten, kiam s-ro Weide resorĉis antaŭ la okulojn de la geamikaro la restadon kaj ekskursojn per bela filmo, kiun li sukcesis fari en la paŭzoj.

Kiam la adiaŭaj «hip, hip, hurá» ondadis tra Ry, ĉiuj ĵuris reveni venontjare. Koran dankon al ĉiuj, kaj: «Ĝis la ...!»

18-a Kongreso de SAT en Bruselo

En Bruselo okazis la 7-13 aŭgusto, la 18-a SAT-kongreso. Granda sukceso ĝi estis. El 18 landoj venis 709 aliĝoj, dum efektive ĉeestis 659 kamaradoj el 16 landoj (Litovio, Estonio, Alĝerio, Maroko, kaj Java-insulo estis reprezentitaj). Tre bone estis organizita la loĝado de la plej malriĉaj kongresanoj, en amasloĝejo (300 personoj) kaj en tendejo (100 personoj en 35-40 tendoj) kun ĉiuj higienaj servoj, inkluzive de lavejoj kun duŝoj kiujn la kamaradoj multe ŝatis.

La interfratiga kaj la solena kunvenoj okazis en la granda festsalono de la Brusela «Popoldomo». Milpersona ĉeestantaro ĝuis la artajn prezentojn kaj la alparolojn de la reprezentantoj de la dekduo de laboristaj organizoj sindikataj, kooperativaj kaj politikaj, kiuj — karakteriza fakto — preskaŭ ĉiuj sin esprimis en nia lingvo. Kdo P. Neergaard, direktoro de plantopatologia laboratoro de Kopenhago, informis la kongreson pri gravaj antaŭenpaŝoj de Esperanto inter la sciencistoj. Li konigis ke per Esperanto li sukcesis akiri gravajn por lia fakto informojn kiuj nur estas publikigitaj en bulgara kaj en pola lingvoj.

Dum la tuta kongreso (laborkunsidoj, festoj kaj ekskursoj al belgaj Ardenoj) regis vera harmonia, amikeca atmosfero. La raporto de la Plenumkomitato de SAT estis unuanime, escepte de unu voĉo, aprokata. Okazis fak- kaj frakciaj kunvenoj. Interalie ni aŭdis pri vigla laboro de la fakoj: instruista, naturamika kaj junulgasteja, socialista kaj sennaciista frakcioj.

Per unuvoĉa aprobo oni elektis la metropolon de Danlando, Kopenhago, kiel kongresurbon 1939.



Jen kiel la Esperanto-grupo en la nederlanda banloko Bergen propagandis en procesio dum tiea florifesto.

(La kliŝon afable disponigis la Fremdultrafika Asocio V.V.V. en Bergen N.H.)

Denove bela venko de la Esperanto-Societo de Finnaj Fervojistoj

Dum la 14 lastaj jaroj, la Esperanto-Societo de Finnaj Fervojistoj gajnis plurajn venkojn de sia fervoja administracio: En la jaro 1924 ĝi ricevis la permeson aranĝi du prelegojn ĉiujare pri Esperanto ĉe la lernkursoj por junaj praktikantoj, estontaj fervojfiscistoj.

En la jaro 1936 la sama administracio oficiale promesis enkonduki ankaŭ nian lingvon en la lingvajn kursojn, kiujn ĝi nuntempe aranĝas en germana kaj angla lingvoj por fervojistoj en la plej gravaj stacioj. La kursoj en Esperanto estas liberaj kaj povas okazi nur tiam, kiam sin anoncas sufiĉe multe da partoprenontoj kaj se la budĝeto tion permesas.

Samjare la administracio de la fervojoj donis la permeson surmeti sur la murojn de la atendejoj de pr. 30 stacidomoj tabelon pri la lokaj esperantistoj, kiuj senpage gvidas eksterlandajn turistojn esperantistajn.

Antaŭ kelke da semajnoj la societo ricevis sian plej lastan venkon: la nomita administracio permesis surnajli sur la murojn de la atendejoj de ĉiuj urbaj kaj plej gravaj provincaj stacidomoj deklaron pri Esperanto kaj kiamaniere oni povas eklerni tiun lingvon. La afiŝo enhavas ankaŭ adresojn de la plej gravaj eksterlandaj Esperanto-organizaĵoj por aliĝo.

Estas rimarkinde, ke ĉiujn reklamilojn oni rajtis senpage dissendi al stacioj kaj ke la dissendon faris oficiale la reklamoficejo de l' fervoja administracio mem.

★

Esperanto ĉe la Olimpiado de Helsinki 1940

Por ke Esperanto estu jam nun ekuzata en la preparaj aranĝoj de la olimpiado de Helsinki, sendu grandamase informpetojn al la komitato de la Olimpiado sub adreso «Komitato de l' Olimpiado», Helsinki, Finnlando. Admonu la komitaton tuj starigi Esperanto-Oficejon por Olimpiado.

La internacia kongreso de IOGT, kiu okazos kelkajn tagojn pli frue ol la nomita Olimpiado, jam uzas nian lingvon oficiale, eĉ la programo de unu tuta festo estos en nia lingvo. Esperanto-Societo de finnaj fervojistoj per gazetararo jam faris tiucelan proponon al la komitato.

H. S.

PROPAGANDU

ĉiam, ĉie, ĉiel
kiam, kie kaj kiel eble !

Nia afero en Japanujo ne ripozas

Fervoja Ministerio eldonas konversacian libron kun Esperanto-teksto.

La Fervoja Ministerio, jam tre familiara al la tutmonda esperantistaro pro sia dika gvidlibro «Japanlando» kaj bela «Japanujo», eldonis en aprilo nunjara konversacian libron, kiun ĝi disdonis al hoteloj, gvidistoj kaj similaj turismaj entreprenoj. La libro entenas tekstojn en la lingvoj angla, franca, germana, itala, hispana, esperanta, kaj japana.

Gvidlibro de Osaka.

La urbo Osaka eldonis en junio nunjara gvidilon de Osaka en Esperanto. Ĝi estas ricevebla de: Turisma Fako, Direkcio por Industrio, Osaka Ŝijakuŝo. — En junio Osaka Esperanto-Societo organizis elementan kurson de Esperanto, kiun partoprenis 130 urbanoj!

Unua Esperanto-disaŭdigo eksterlanden.

La Tokio Centra (JZJ kaj JZK) disaŭdigis por la unua fojo esperantlingvan paroladon eksterlanden, la 1.8.1938 matene; parolis Prof. C. Fuzisava pri la «Esperanto-movado en Japanujo». La japanaj esperantistoj petas la eŭropajn samideanojn, amase sendi dankleterojn al la Radio-stacio de Tokio. Tio faciligos ilian klopodon enkonduki Esperanton en Radion en Japanujo.

D-ro Istvan Mezey, hungara sendito, kaj Esperanto.

D-ro Istvan Mezey el Budapeŝto venis al Japanujo en la fino de 1937 kun kultura misio. Li restis en nia lando dum duonjaro. Li estas esperantisto de tre longe. La 22.3. Tokia Esp. Klubo okazigis bonvenan kunvidon por li, kaj tio estis grandlitere raportita en kelkaj ĵurnaloj. D-ro Mezey kunportis pentraĵojn de la fama hungara pentristo Jasik. La verko konsistas el 12 bildoj pri «Johano la Brava» de Petöfi. La doktoro donacis la desegnaĵojn al la Teatra Muzeo de Waseda Universitato. Sed bedaŭrinde tiu famega poemo ne estas konata en Japanujo, kaj neniu sciis pri la temo. Aŭdinte tion, JEL faris por la Muzeo detalan klarigon de la verko kaj metis sub ĉiu bildo la klarigon faritan de JEL. Krome JEL elmontris multajn Esperanto-tradukojn el la hungara literaturo.

JEL eldonis broŝureton en Esperanto pri «La nuna ĉina afero» de D-ro Mezey, inkluzive de lia «Impreso de Japanujo», kaj dissendis ĝin al la tutmondaj delegitoj de IEL. Samaj verkoj aperis ankaŭ en la lingvoj angla, franca kaj germana. Ĉe la forveturo el Japanujo D-ro Mezey estis ordenata per la Sankta Trezoro de la Tria Distingo. La ĵurnaloj, informante pri lia honorigo, menciis ankaŭ la Esperantan broŝuron, kiel unu el liaj meritoj.

Esperanto-eldono de «Impreso pri Japanujo sub la konflikto», de Claude Farrère.

S-ro Claude Farrère, membro de la Akademio Franca, kiu vizitis Japanujon en la printempo, skribis sian impreson pri Japanujo dum la ĉina afero, kaj ĝi aperis la 30.4. en «Asahi», la plej influa ĵurnalo en Japanujo kun eldonnombro de tri milionoj. La ĵurnalejo senkompetence permesis al JEL eldoni esperantlingvan tradukon de la artikolo, la Ministerio de Publika Klerigo permesis al JEL reprodukti, por uzi ĝin kiel desegnaĵon sur la kovrilo, la pentraĵoj de Yokoyama-Taikan, majstro de la japana pentro-arto, «La Imperia Palaco», kies aŭtorrajton havas la Ministerio, kaj la Turisma Direkcio de la Ministerio de Fervojoj pruntedonis multajn fotojn kiel materialon por la ilustrado.

Oficejo 'Esperanto ĉe la instruado'

(C. Krusemanstr. 43/3, Amsterdam-Z., Ned.)

Alvoko al la tutmonda samideanaro.

Gesamideanoj,
Ni, nederlandaj esperantistoj, staras antaŭ grava okazantaĵo.

En la monatoj novembro aŭ decembro nia regna deputitaro (dua ĉambro de la parlamento) pritraktos novan leĝon pri la edukado de geinstruistoj kaj la budĝeton de la instrua ministro. Nia oficejo decidis aranĝi antaŭ ĉi tiu pritraktado

Nacian Kongreson por Esperanto en la Lernejoj, kiu okazos en Hago, la 5-an de novembro, je la 15-a horo, en granda salono.

Jam antaŭ kelkaj monatoj deputitaro de nia oficejo preparolis niajn dezirojn kun la direktoro ĝenerala por la instruado. La skriba pritraktado de la nomita leĝo jam okazis, la ministra starpunkto ne estis favora al nia afero. Sed la buŝa ankoraŭ okazos, kaj ni deziras influu la finan decidon. La situacio ne estas senesperiga: sufiĉe grava parto de la deputitaro certe subtenos nin. Estos nia tasko ŝanĝi tiun parton en plimulton.

Nia oficejo, kiu reprezentas proks. 89000 personojn, invitos al la kongreso: la ministraron, la direktoraron ĝeneralan, ĉiujn deputitojn, la regnan instru-konsilantaron, la ŝtatajn inspektorojn, skabenojn de grandaj urboj, ktp.

Kvar eminentaj parolantoj estas petataj, enkonduki la temon laŭ propra gusto.

Kaj ni, nederlandaj esperantistoj, zorgos pleniĝi eĉ la plej grandan salondon.

Sed al vi, eksterlandaj geamikoj, ni alvokas: **Sendu simpati-esprimojn multegnombrajn, poŝtkarte, letere, telegrame, unuopajn kaj kolektivajn!** Sendu ilin al la oficeja adreso.

Kaj ni montras en la kongreso la rezultaton de ĉiu tiu ununura alvoko, por konvinki la aŭtoritatojn same kiel la ceteran publikon, ke nia devizo

«Esperanto en la lernejoj»

same vivegas en- kaj eksterlande.

Kun samideanaj salutoj,
P. W. B a a s, prezidanto.

REMEMOROJ

Post la germana Esperanto-kongreso en Chemnitz, 1932, mi vizitis la samideanojn en Plauen. Profesoro D-ro Penndorf min akceptis ĉe la stacidomo kaj afable min gastigis. Vespere estis kunveno de la samideanoj. Ni interparolis jen Esperante jen per germana lingvo. La postan tagon kelkaj el ni ekskursis en la belan ĉirkaŭaĵon. Dum tiu promeno unu el la junaj esperantistoj diris al mi: «Tion, kion vi diris per Esperanto, mi ĉion bone komprenis, sed ne ĉion kion vi diris per la germana lingvo». Mi havis en mia parolo iom la idiomon de Suda Germanujo, pri kiu la alia ne havis sufiĉan sperton, ĉar li estis el Meza Germanujo.

La Krakovan internacian kongreson 1912, partoprenis fraŭlino el Usono. Ŝi nur sciis la anglan kaj la Esperantan lingvojn. Tamen ŝi povis kun ili vojaĝi ĝis Moskvo. Revojaĝante ŝi vizitis min en Stuttgart. Mi iris kun ŝi en mian ĝardeneton malantaŭ mia loĝejo kaj montris al ŝi la ĝarden-dometon, sur kiun mi estis pentrinta la vorton «Esperanto» por propagandi per tio ĉe la preterirantoj. Malsuprenirante de la ĝardeno, ni kompreneble interparolis per Esperanto. Tion aŭdis la servistino de la familio, kiu loĝas sub mia loĝejo. La servistino sciis, ke mia familio vivas vegetare kaj ŝi ankaŭ aŭdis, ke mi scias la internacian lingvon. Tial ŝi diris al sia mastrino: «Jus sinjor' profesoro malsuprenvenis el la ĝardeno kun sia fratino, ili interparolis vegetare».

P. Christaller

Mortis Frederiko Karinthy

fama hungara verkisto kaj poeto, estinta prezidanto de Hungarlanda Esperanto Societo, la 29-an de aŭgusto. La nomo de Karinthy konas la esperantistaro el tradukoj: « Margaŭ matene » (lia plej sukcesa teatraĵo), « Norda vento » (novelkolekto) kaj kelkaj noveloj aperintaj en gazetoj kaj en « Hungara Antologio ». Li sciis nur malmulte Esperanton, sed ofte parolis publike pri ĝi, verkis pri ĝi artikolojn, menciis ĝin en siaj humoraĵoj, kiuj ĝenerale estis ŝatataj pro respekulo de la profundaj homanimaj trajtoj. Li gvidis dufoje publikajn diskutvesperojn pri Esperanto, kiujn partoprenis laŭ invito de HES aliaj konataj verkistoj. En 1932 dum Internacia PEN-Kongreso de Verkistoj li eĉ prezentis proponon por kunlabori kun la Esperanto-movado. En la lasta tempo li projektis novan Enciklopedion por difini la signifon de la vortoj. En artikolo pri Esperanto en marto li eĉ deklaris ke pro la nuna kaoso en la opiniaro de diversaj popoloj oni devos unue krei la konvencion inter la nacioj pri la signifo de la vortoj, antaŭ ol oni kreas konvencion por enkonduki Esperanton. Li naskiĝis en 1888 en Budapeŝto, volis esti matematikisto, sed forlasis la universitaton por fariĝi populara verkisto. En sia, ankaŭ en Esperanton tradukita verko « Vojaĝo al Faremido » li daŭrigas la rakontojn de Swift, kondukante la faman vojaĝanton Gulliver al mirinda, mekanika lando, kie oni parolas internacian muziklingvon. Nun li espereble atingis alian mirindan landon, kie li trovos tion, kion li plej multe ŝatis dum sia tera vivo: interkompreniĝi kun homoj samideaj. Ĉe la enterigo la esperantistaron reprezentis s-ro Paŭlo Tolnai kaj edzino. P. B.

El la vivo de f-ino Saxl †

Aŭdinte pri la malfacilaĵoj eltrovi la parencojn de nia plej kapabla instruistino aŭ datojn el ŝia antaŭesperantista vivo, mi regis ŝiajn leterojn direktitajn al mi kaj pripenis ŝiajn paroladojn. Jen kion mi povas sciigi:

La patro de f-ino Saxl estis ambasadoro de la aŭstria kortego ĉe la germana registaro en Berlino. Ŝi bone rememoris la aŭstrian imperiestron Franz-Joseph, kiu ĉiam estis tre afabla al ŝi, tiama etulino.

Jam frue f-ino Saxl kaj ŝia sola frato perdis la patrinon, kaj onklino (ĉu vera, aŭ nur tiel nomita, supozeble s-ino Köhler en Charlottenburg) zorgis pri la edukado, kiun Margareto ricevis en Berlino. F-ino Saxl studis en angla kaj Pariza universitatoj, havis talenton por pianludo (ŝi premie gajnis pianoforton), sed ŝia talento por lingvoj estis ankoraŭ pli granda.

F-ino Saxl poste perdis ankaŭ sian amatan patron, pli poste pro la milito sian fianĉon kiu estis anglo, kaj fine ankoraŭ la fraton kiu mortis sekve de la vivo en la tranĉeoj kaj pro familiaj ĉagrenoj. Lia filo nuntempe vizitas lernejon en Germanujo, kaj siajn libertempojn li pasigas en Nederlando. Se io estis trovita, kio havus valoron, tiu knabo, kiun ŝi tre amis, certe rajtus ricevi ĝin.

Poste f-ino Saxl laboris kiel gvidantino de la lingvofako en komerca lernejo en Berlino. Tiutempe, antaŭ ses jaroj, ŝi konatiĝis kun Esperanto, pastro Cseh kaj lia metodo. S-ro Cseh kaj ŝi loĝis en la sama pensiono ĉe s-ino kaj f-ino Lotte B. La sinjorino estis kvazaŭ dua patrino por Margareto, kaj la fraŭlino estis

kvazaŭ ŝia fratino. Antaŭ nelonge mortis la 70-jara sinjorino, kaj Margareto travivis malĝojigajn tagojn kune kun Lotte.

Dum la lastaj jaroj, migrante trabatalante sin tra la vivo, multfoje tro peza por fraŭlino, ŝi fariĝis tiu Margareto Saxl de la verda movado, kia ni ŝin konis, multe konata kaj amata sed bedaŭrinde ankaŭ enviata eŭropanino, kiu nun pace ripozas en la koro de sia laborkampo, honorate de ĉiuj kiuj ŝin amis.

Ŝi multe amis en sia vivo, la varma koro de v a s a mi kaj ne povas toleri malamon, eĉ ne povis trankvile morti pro tio. Ni sekvu ŝian ekzemplon, eĉ se tio kelkfoje ŝajnas malfacila. Ne per malamo sed per amo venĝu la verduloj; kaj ne per bomboj sed per amo ni venku la homaron.

Amikino

el la plej mallumaj tagoj de Margareto.

Esperantista Interhelpo

Tajlorino tre sperta, 33-jara, laborinta por unuarangaj modmagazenoj, kun bonegaj atestoj, perdis oficon pro rasa kaŭzo. Serĉas rifuĝon en alia lando. Scias krom sian metion la mastrumadon, escepte de pezaj laboroj. Ŝatas infanojn. Parolas flue Esperanton, germanan kaj scias iom la francan. Posedas regulajn paperojn kaj ricevas pasporton. Ofertojn sub « Esp. Interhelpo 4 » peras la redakcio.

Komercisto 40-jara, ŝtatano germana, de juda deveno kun edzino ne-juda, serĉas laboron en transmara lando, prefere tie kie li povas ankaŭ labori por la movado. Tre bona propagandisto, vendisto, dum multaj jaroj reprezentanto de grandaj firmoj (branĉo por malmultekostaj ornamadoj), fakulo ankaŭ en malgrandleaj varoj. Disponas pri bonegaj atestoj, estas sana kaj energia. Akceptas kion ajn, povas veturigi aŭtomobilon. La edzino scias krom la germana kaj Esperanto ankaŭ perfekte la anglan. Ofertojn sub « Esp. Interhelpo 5 » peras la redakcio.

Kiu volos helpi? Ŝtatano germana en Vieno, 53-jara, kun edzino kaj 14-jara filino, devas trovi pozicion en transmara lando. Serĉanto, malnova esperantisto, distingita per argenta medalo de veterano, estas eksperto pri librotrenado, ĵure aprobita, parolas germanan kaj hungaran lingvojn, scias sufiĉe la anglan, francan, italan, estas preta akcepti kia ajn laboron. Politike sen riproĉo, disponas je regulaj paperoj. Ofertojn sub « Esp. Interhelpo 6 » peras la redakcio.

Ŝtata oficisto (doktoro de juro), aŭstrianino, 30-jara, edziĝinta, kristana konfeso, perdis la postenon, ĉar la patro estis judo. Serĉas iun ajn okupon. Posedas krom germana kaj Esperanto la anglan, francan, ĉeĥan lingvojn. Rivecis brilan ateston pri sia ĝusnuna laboro. Politike nesuspektita. Ofertojn sub « Esp. Interhelpo 7 » peras la redakcio.

Kiu helpos? 24-jara judo Viena, bone aspektanta, absolventa juristo, parolas germane, esperante kaj angle, havas sciojn en franca kaj itala lingvoj, estas perfekta aŭtomobilveturigisto kaj stenografas germane kaj angle, serĉas kaj akceptas ian ajn laboron. Skribu al H.L. Enoch, Kaiserstrasse 67, **Wien VII**, Ostmark, Germanujo. (538)

Ni funebras

— F-ino Margarete SAXL, la konata Cseh-instruistino, mortis pro korparalizo dum la 30-a Universala Kongreso, la 4.8., en aĝo de 49 jaroj. Ŝi estas enterigita en la Parka Tombejo de Hendon (Londono). La tuta esperantistaro funebras pro la morto de la sperta pedagogo. Pliajn detalojn vidu en la kongres-raporto!

— La 29.7. mortis pro kormalsano fidela amiko, s-ano William DAVIES en Swansea (Kimrujo). Ĉiam bona kunlaboranto en Anglujo kaj Kimrujo, li ĉeestis multajn kongresojn kaj estis Membro-Subtenanto de IEL. Li ripozu pace!

— Post mallonga malsano kaj operacio mortis la 2.5. en Wellington (Nova Zelando) s-ro Edward Collins JACK. Li naskiĝis en Perth (Skotlando) antaŭ 59 jaroj. Li estis kasisto de Nov-Zelanda Esperanto-Asocio post ties fondiĝo en 1929, prezidanto de Wellingtona Esperanto-Klubo (1930-31), ankaŭ klubinstruanto, subtenanto de UEA kaj IEL. Li estis ideala samideano, kiu vivis imitindan esperantistan vivon. Lia nomo kaj lia sindona laboro por nia afero restos ĉiam en nia memoro.

— S-ino ELLERSIEK, edzino de la konata esperantista eks-eldonisto Friedrich ELLERSIEK en Berlin (Germanujo), mortis la 25.7., post longa malsano. — Al s-ro ELLERSIEK niajn korajn kondolencojn!

— La 7.8. mortis subite la fidela samideanino f-ino Zofio WITOSCH, prokuristino de Novy-Bohumín/Oderberg (Ĉeĥoslovakio). Ŝi esperantiĝis dum la mondmilito, partoprenis kelkajn mondkongresojn, kunlaboris en la movado, kiun ŝi subtenis ne nur morale sed precipe ankaŭ finance. Multaj gesamideanoj akompanis ŝin kun krono en verdstela formo al la tombo. Ŝi ripozu en paco!

— F-ino Alice Maud STACY, el Buckhurst Hill (Anglujo) mortis la 27.8. en sia 53-a jaro. La sekvintan mardon granda amaso da geamikoj funebris ŝin en St. John's Churchyard, apude. Dotita de elstara ĉarmo de korpo kaj animo, ŝi vigne kaj sindoneme laboris por ĉio bona kaj bela en la vivo.

F-ino Stacy esperantistiĝis jam en 1907, kiam ŝi aŭskultis la faman prelegon de D-ro Zamenhof en la Londona Guildhall. Du-tri fojojn ŝi kondukis la diservojn en St. Ethelburga's, kie ŝia trankvilanima kuraĝigo kaj sprita bonvolemo ĉarmis ĉiujn aŭskultantojn. Por ŝi mem ĝuste taŭgas ŝiaj propraj vortoj je la memoro de nia amita Margaret Blaise:

« Milfoje ni dankas Dion, ke Li metis tiun belan vivon inter ni — milfoje ni preĝas, ke Li donu al ni la amon kaj kuraĝon por subteni la bonajn aferojn, kiujn ŝi subtenis. Ni vivigu ŝian memoron per prizorgado de la semoj, kiujn ŝi plantis. Dio estas amo, kaj tiu, kiu vivas ample, estas interpretilo de Dio sur la tero. »

— Pastro John H. FAZEL, la veterana fervora esperantisto, ne plu estas inter ni. Li forpasis el nia rondo familia la 25.7., 83-jarulo, en San Antonio (Texas, Usono). Honoron al lia memoro!

— La 15.6. forpasis en Annapolis (Maryland, Usono) s-ino George W. MOSS, 86-jara. Multajn jarojn ŝi estis fervora membro de EANA. Ŝi ripozu pace!

— Mortis Frederiko KARINTHY, fama hungara verkisto kaj poeto, estinta prezidanto de Hungarlanda Esperanto-Societo, la 29.8., en Budapeŝto (Hungarujo), 50-jara. — Li restos neforgesita.

En la venonta numero ni dediĉos al li pli detalan nekrologon.

La Esperanto-Literaturo kreskas

Dorothy Canfield Fisher: Infanoj kaj patrinoj. Tradukis T.J. Guéritte. — 175 p. 12,5 x 19 cm. Prezo bind. 3 s. 6 p. Eldonis: E. P. C. Havebla ĉe IEL, Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo, aŭ por 1.95 guld. (inkl. sendkostoj) de Heroldo de Esperanto, Scheveningen, Nederlando.

Okazis dum la lastaj kelkaj generacioj granda ŝanĝo en la vidpunkto pri la edukado de infanoj, precipe pri iliaj rilatoj kun la gepatroj. Oni forlasis jam grandnombre la vidpunkton pri rigora aŭtoritateco de la gepatroj; aliflanke ankaŭ la alia ekstremo, permesi al la infanoj kion ajn ili volas, seniluziigis per la rezultoj. Restas, kiel preskaŭ ĉie, ankaŭ sur tiu ĉi kampo plej taŭga la ora meza vojo. En la unuaj vivojaroj la infanoj certe bezonas fortan kondukantan manon de la gepatroj; sed poste ili pli kaj pli evoluas je individuoj, kiujn oni ne povas trakti sen konsidero pri ilia propra kvankam ne jam plenevoluinta personeco. Kaj kiam ili plenkreskis, ili fakte posedas jam la rajton decidi pri si mem.

La aŭtorino estas moderna amerika patrino kaj bona psikologino. Ŝi ne skribis libron el teorio sed el propraj sperto kaj observado, kaj se oni sekvas ŝiajn konsilojn, certe estos atingeblaj pli intimaj interrilatoj inter gepatroj kaj gefiloj ol ili ekzistas ofte en la nuna tempo.

Pripensiga libro, kiu povas esti utila al ĉiuj gepatroj. M.

B. Giedra: Violetoj. Versaro. 64 p. 10,5 x 16 cm. Prezo 1.25 lt. aŭ 0.25 dolaro. Eldonis Litova Esperanto-Asocio. Havebla de librejo « Spaudos Fondas », Kaunas, Litovujo.

« Violetoj » nomis la aŭtoro sian versaĵaron. Violetoj (aŭ violoj) estas tiuj bluaj floroj modestaj, florantaj kaŝe inter la herbaro prin-tempe. Ankaŭ la versoj de B. Giedra estas modestaj floroj sur la herbejo de l' Esperanta poezio. Plejparte 4-liniaj strofoj simplaj, senafektaj, sed ne senĉarmaj. Aparte bela la traduko el Puŝkin « Vintra vojo », kies duan strofon mi citas:

Laŭ enua, vintra vojo
Trotas trio en konsent',
Sonorilo en malĝojo
Lace tintas en silent'.

Entute la libreto enhavas 50 versaĵojn, parte originalajn, parte tradukitajn. M.

D-ro Francé Prešeren: Bapto ĉe Savica. Esperantigita de Damjan Vahen. Ilustrita de Tone Kralj. — 32 p., 13,5 x 18,5 cm. — Eldono de « Niaj Vizaĝoj », Ljubljana, Jugoslavio. Prezo ne indikita.

Toyokiti Takase: Pri la rilatoj inter kemiaj strukturoj kaj fiziologiaj agoj. Tradukis el la janana lingvo Tooru Hattori. — 110 p. 15,5 x 22,7 cm. Prezo ne indikita. — Eldonis: Librejo Kaniŝa, Teramaĉi-Ebisugaŝa, Kioto, Japanujo.

Foire de Reichenberg, Ĉeĥoslovakio, 14-21 aŭgusto 1938. Afiŝo en du formatoj: 62 x 94 cm., kaj 25 x 37 cm., kaj glumarko 3,5 x 5 cm. Kun la supre citita esperantlingva teksto kaj kun bildo de Merkuro ĉe direktirado, sur kiu troviĝas la fama Reichenberg'a magneto.

Silka legosigno kun enteskita portreto de D-ro Zamenhof, kies vizaĝo kaj subskribo aperas klare sur la blanka fono. 15 x 5 cm. Prezo 5 belg. fk. Eldonis: Belga Esperanto-Instituto, Lange Leemstraat 127, Antwerpen, Belgujo.

Rudolf Rakuša: Esperanto. Uĉbenik mednarodnega jezika za ŝole, teĉaje in samouke. 151 p. 12,5 x 17 cm. Prezo din. 16.—. Eldonis: Založil Klub esperantistov v Ljubljani, Jugoslavio.

Didakta, ilustrita lernolibro de Esperanto por praktika komenca kurso de Delfi Dalmau, L.K. — Nova eldono plibonigita. Broŝuro 30-paĝa, 17 x 24 cm. Prezo: 1 ekzemplero 1 angla ŝilingo, 30 ekz. 1 £. Havebla ĉe Delfi Dalmau, Apartado 5081, Barcelona, Hispanujo.

En ĉi tiu maldika kajero troviĝas pli da lernmaterialo ol oni supozas. 12 lecionoj, kun unu sola escepto ilustritaj, havas simplan konstruon: tekston (« por rakonto kaj priparolo, lego kaj legigo, kaj skribigo » — indiko senbezone ripetata antaŭ ĉiu leciono), en kiu troviĝas la vortoj kaj esprimoj bilde prezentitaj, kaj ekzercojn (« por respondado, interparolado, legigo kaj skribigo » — same senbezone ripetata ĉiulecione). Pure gramatikaj klarigoj kaj vortdifinoj absolute mankas, ĉar, kiel diras la aŭtoro, « post la baza kaj vivanta parolata lingvo, venu la gramatiko kaj la vortaro, kaj la gramatikisto kaj la vortaristo; sed unue la vivo kaj poste la filozofio ». Bone; sed se ĉe tia metodo la instruanto ne estas tre taŭga kaj lerta, malmulta sukceso aŭ eĉ plena fiasko de la kurso estas timindaj.

Entute oni povas sincere diri, ke « Didakta » en la mano de bona instruanto en mallonga tempo produktos praktikajn esperantistojn, kaj mi deziras, ke por sia disvastiĝo « Didakta » povu rajte apliki la klasikajn vortojn presitajn sur la dorsflanko de la kovrilpaĝo, kiuj ankaŭ en Esperanto efikas tiel lapidare kiel en la fontlingvo: veni, vidi, venki! B.K.

Rouen, Ville Musée. 68-paĝa, riĉe kaj bele ilustrita gvidlibro pri la franca havenurbo Rouen, ĉefurbo de la provinco Normandio, kun urboplano. Sur p. 36 troviĝas artikoleto en Esperanto « Rouen, muzea urbo ». Prezo 5 fr. fk. Eldonita de: Syndicat d'Initiative de Rouen, Rouen, Francujo.

Vizitu Loveno, Belgujo! 2-paĝa gvidfolio pri la vidinda urbo Leuven/Louvain. Senpage ricevebla de s-ro M. Wauters, Dieststr. 184, Loveno.

Haapsalu en Estonio. 16-paĝa ilustrita prospekto en Esperanto, pri tiu sanigŝlima kaj mara kuraĉloko, kie iam caroj de Ruslando serĉis resaniĝon kaj ripozon, kaj kie ankaŭ somerrestadis la fama komponisto Ĉajkovskij. Kun urboplano. Senpage ricevebla de: Haapsalu Linnavalitsus, Kooli str. 2, Haapsalu, Estonio.

Gids voor Gaasterland. 24-paĝa ilustrita broŝuro, eldonita de V.V.V. Gaasterland, Balk, Nederlando. — Sur p. 21/22 troviĝas esperantlingva « Invito al esperantistaj gelegantoj ». Gesamideanoj bonvolu turni sin al f-ino G. Poepjes, « La Verdaj Optimistoj », Domo « Espérance », Nieuwe Weg, Harich onder Balk (Fr.), Nederlando.

La internacia faŝismo detruas la arton de Hispanio. Broŝuro bone presita kaj ilustrita. 32 p. 16 x 23 cm. Eldonis (kaj de tie supozeble senpage havebla): Nacia Patronado pri Turismo, General Tovar 5, Valencia, Hispanio.

Jarlibro de la Esperanto-Movado 1938. (Universala Esperanto-Asocio, Palais Wilson, Genève, Svislando.) 255 p., 11,3x16 cm.

Programo de la Internacia Junularkunveno en Groot, Nederlando, 10-17 aŭgusto 1938. Bela presaĵo 4-paĝa sur kartono, kun alegoriaj vinjetoj.

31-a Kongreso de Esperanto-Asocio de Nord Ameriko. 8-paĝa programo kun saluto de Lidia Zamenhof kaj kun 14 kantotekstoj.

Esperanto-Katalogo de la libroj, haveblaj de Librejo « Frateco », Sevlievo, Bulgarujo. — 16 p. — Senpage ricevebla.

A. Den Doolaard: Ĉu nova milito? Jes ... Kial? 15 p., 15 x 23 cm. Traduko de nederlanda broŝuro de la sama aŭtoro. Havebla por 0.12 gld. ĉe R. Boersma, Badweg 5, Huizum (Fr.), Nederlando.

La aŭtoro ĵetas iom da lumo malantaŭ la kulisojn de la « laboro » de tiuj, kiuj per la milito profitas, t.e. la internaciaj militindustriistoj. Aŭtoro opinias ke venos nova milito, ĉar ja tiuj militindustriistoj plu volas profiti. Supozeble li estas prava. Tamen estas ne nur la militindustriistoj kiuj puŝos la mondon en novan militon... M.

Propagandiloj el Finnlando. Senriproze laboras nia samideano H. Salokannel en Uusikau-punki, eldonante diversspecajn propagandilojn pri Esperanto. El la lastatempaj ni citas la jenajn:

Kehitystä on aina hullunkurisin väittein vastustettu (La progreso estas kutime per burleskaj asertoj kontraŭstarata).

Suomen Kristillinen Esperantoliitto (pri la graveco de Esperanto por internacia kristana misio).

Raittiusväki yhteisrintamaan alkoholismania vastaan (pri valoro de Esperanto por abstinuloj).

Englannissa opiskellaan helppoa maailman-kieltä (pri Esperanto en Anglujo).

Esperanto matkailukielenä (pri Esperanto kiel turista, koresponda kaj kongresa lingvo).

Esperanto (kartona surmura tableto, 24,5 x 21 cm., kun propaganda teksto pri Esperanto, IEL ktp.).

A.G. Provost: Stenografaj gamoj. Mallongaj tekstoj pri diversaj temoj por trafi stenografan rapidecon kaj ekzerciĝon por daktilografio. — 73 p., 21 x 27 cm. Hektografita. Prezo 9 fr.fk. — Eldonis: Stenografika Instituto Tutmonda, 9 Boul. Voltaire, Issy-les-Moulineaux (Seine), Francujo. — La subtitolo klarigas la celon de tiu ĉi broŝuro. La stenografotaj-ekzercoj estas interesaj kaj laŭgrade kondukas la ekzercanton de 60 ĝis 200 silaboj minute.

Petro Danov: La majstro parolas. La parolo de la granda universala frataro. — 153 p., 13x17,5 cm. Eldonis « Frateco », Sevlievo, Bulgarujo, de kie ĝi estas havebla por 25 levoj aŭ 4 resp.-kuponoj.

La kontraŭuloj asertas

ke, kvankam per Esperanto oni eble kapablas korespondi, tamen buŝa interkompreniĝo ne povas esti kontentiga, ĉar la diversnaciaj tro malsame prononcus ĝin. Al tiaj kontraŭparolantoj ni rekomendas viziton al universala Esperanto-kongreso, kie anoj de 30-40 nacioj dum tuta semajno aŭ pli longe brile kaj senmanke interkompreniĝas per la internacia lingvo. La diferenco inter la prononcado de Esperanto ĉe la diversnaciaj estas tiel malgranda, ke ĝi neniel malhelpas la interkompreniĝon. Tiu diferenco estas, ekzemple, ĉe svedo kaj italo, aŭ ĉe polo kaj japano, malpli granda ol la diferenco, ekzemple, inter la prononcado de la altgermana lingvo ĉe vilaganoj el rejnlanda Eifel-montaro kaj el bavara distrikto Oberbayern.

Lidia Zamenhof :

Letero el Ameriko

Jam preskaŭ unu jaro pasis, de kiam mi forlasis la malnovan kontinenton, sed la eterne rapidanta vivo de la nova mondo tiel potence kaptis min en sian vortikon, ke apenaŭ nun, profitante la librempon, mi povas eksidi al mia skribmaŝino, por dividi kun la legantoj kelkajn el miaj impresoj pri Ameriko.

De kio komenci? Ĉu paroli pri la pasportaj, vizaj kaj devizaj malfacilaĵoj, tiel bone konataj al la loĝantoj de la malnova mondo? Ĉu pri la oceanvojaĝo per la ŝipo Batory, kiu ligas la polan havenurbon Gdynia kun la havenego de Nov-Jorko? Ĉu diri, kian ĝojon mi spertis, kiam, unu tagon antaŭ la alboardiĝo, radiotelegrafisto transdonis al mi la unuajn salutojn el la kontinento, kiuj estis kvazaŭ unuaj birdoj, anoncantaĵoj, ke la tero jam estas proksime? Ĉu paroli pri la tumulto kaj emocio, videbla sur ĉiu vizaĝo malgraŭ masko de indiferenteco, kiam usonaj oficistoj komencis sur la ŝipo kontrolon de pasportoj, rimedoj, deklaroj, certigoj, por decidi pri vivo aŭ morto: enlaso aŭ nenlaso de fremdulo sur la usonan teritorion? Kio okazis en la lasta momento kun tiu maljunulino, al kiu mi helpis prepari ŝian dogan-deklaron pri samovaro kaj festaj kandelingoj, la lastaj memorajoj el la malnova mondo, el la malnova vivo? Nur pli malfrue la penso pri ŝi venis en mian kapon, ĉar dume mi mem travivis iom da emocio, kiam mia pasporto malaperis en la paperujo de oficisto, « kontrolonta » la verecon de miaj asertoj pri la celo de mia vojaĝo kaj pri la organizaĵo, kiu min invitis. Feliĉe oni atendis min sur la kajo. La sekretario de la Bahaa Nacia Spirita Konsilantaro, laŭ kies invito mi venis en Amerikon, estis tie por garantii pri mi per sia subskribo, rehavigi al mi la pasporton kaj trakonduki min tra bone gardataj trairejoj — sur la amerikan kontinenton. Kiel agrable estis, farante la unuajn paŝojn sur la nova tero, ekvidi la verdajn stelojn kaj ekaŭdi, en la lando de estonteco, la lingvon de estonteco!

La dogana kontrolo pasis rapide, kvankam la doganisto ŝajnis iom miri pro la baterio de kraĵoj, pro la kaŭĉukaj bestoj kaj aliaj necesaĵoj de Cseh-instruisto. Kaj fine mi forlasis aŭtomobile la havenan teritorion, kaj ensorbis min Nov-Jorko, la plej granda urbeĝo sur nia planedo, senkompara pro siaj nubsrapuloj, pro la febra trafiko, pro la amasego da homoj, da aŭtomobiloj, da ĉio, kion la mondo posedas.

Miaj kruroj ankoraŭ tremis, kaj ankoraŭ mi sentis la balancadon de la ŝipo

— sed ne estis tempo pensi pri tio. Mia ĉambro sur la 16-a etaĝo de New Yorker Hotel rapide pleniĝis per ĵurnalisto kaj samideanoj. En Ameriko oni ne perdas la tempon.

Agrable estis revidi malnovajn konatojn. Agrable estis konatiĝi kun novaj. Ĝojige estis vidi membrojn de du movadoj — de la Esperanta kaj de la Bahaa — unuigitajn por labori por la celo, kiu por la unuaj brilas per verda stelo sur la nuba ĉielo de la homaro, kaj por la duaj estas pilaro de nova Ordo de la Mondo, profetita de Baha'ullah. Dum la tuta jaro tiu kunlaborado estis por mi ĉiam fonto de ĝojo. Mi nur menciis la kurson en Lima, kie ne estis antaŭe esperantistoj, kaj kiu estis organizita de bahaanoj. Sen ilia helpo ne estus ankaŭ ebla la unua pedagogia Cseh-kurso en Ameriko, kiun mi antaŭ unu monato gvidis ĉi tie, en Eliot. Ankaŭ la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko alte taksis tiun kunlaboron, kaj esprimis, post la Kongreso en Cleveland, dankon al la Bahaa Organizaĵo pro la elmontrita helpo.

Sed la leganto deziras scii ion pri Nov-Jorko! Jes, kompreneble, mi ne povis ne vidi la imponan statuon de Libereco, kiu, elprofundiĝante el matena nebulo, ŝajnas majeste bonvenigi la ŝipojn, proksimiĝantajn al sia celo. Certe, mi ne povis ne rigardi la Urbegon de sur la pinto de la 103-etaĝa Empire State Building, la plej alta konstruaĵo de la mondo. Kiel sufoka estis poste la aero de la nov-jorkaj stratoj, kaj kiel zumis en miaj oreloj, kiam la lifto, swingiĝanta rapidege supren kaj malsupren, reportis min al la teretaĝo!

Ĉu vi ŝatas glaciaĵojn, kara leganto? Se jes, venu en Amerikon! Ĉi tie vi povos manĝi ilin trifoje tage, sendepende de la sezono. Glaciaĵoj estas kvazaŭ nacia amerika manĝaĵo, kaj oni povas aĉeti ilin en ĉiu apoteko. (Atentu: en la amerikaj apotekoj medikamentoj ŝajnas ludi malplej gravan rolon. Apoteko estas kune kafejo, papervendejo, ktp. Se vi ne scias, kie aĉeti ion, iru aŭ en apotekon, aŭ en universalan magazeton.)

La universalaj magazenoj de la eŭropaj ĉefurboj paliĝas antaŭ la amerikaj. Ĉiu trovos tie ion laŭ sia plaĉo: ĉu altan kvaliton aŭ moderan prezon, ĉu malkaran brilaĵon aŭ valoran juvelon, ĉu lertan konsilon aŭ sentrudan servon. Plej oportunaj tamen estas vendejoj, nomataj simple « 5 kaj 10 », ĉar la plej oftaj prezoj tie estas kvin kaj dek centoj. Tie oni povas aĉeti ĉion, kion oni praktike bezonas en la ĉiutaga vivo:

vintre varmajn gantojn, somere bankostumon, kaj en ĉiuj sezonoj — glaciaĵojn.

Ĉe la liftoj de la universalaj magazenoj deĵoras nigraj liftistinoj. Ekzistas liftoj lokaj kaj ekspresaj; la lastaj haltas nur ĉe aŭ super certa etaĝo. Same okazas en hoteloj kaj grandegaj konstruaĵoj, nomataj simple « buildings », t.e. konstruaĵoj, ĉar la senĉesa haltado de liftoj ĝenus kaj prokrastigus la loĝantojn aŭ interesulojn de la dudeka aŭ trideka etaĝo. Ankaŭ la subtera fervojo de Nov-Jorko posedas duoblajn liniojn; por vagonaroj lokaj kaj ekspresaj. Por diri sincere, ĉi tiun dividon mi trovis ne speciale praktika kaj ofte konfuza; entute la organizo de la subvojoj de Nov-Jorko ne estas, laŭ mia sperto, komparebla al la subvojoj de Parizo.

La loĝantoj kaj gastoj de la franca ĉefurbo plendas pri interpreto en la parizaj subvojoj dum la « horoj de frekventeco ». Se iu el ili nur unu fojon en la vivo troviĝus en nov-jorka subvojo je la kvina horo posttagmeze, li ne parolus plu pri la pleneco de la parizaj komunikiloj. Haringoj en barelo ĝuas komforton kaj lukson de spaco kompare kun nov-jorkanoj en subvoja vagono post la fermo de vendejoj kaj oficejoj!

Tamen ne ĉiuj nov-jorkanoj interpretas sin tiamaniere. Usono estas ja la lando de aŭtomobiloj. Jen karakteriza trajto: en Nov-Jorko oni vidas malmultajn taksiojn. La senfina fluado de aŭtomobiloj konsistas preskaŭ nur el privataj veturiloj.

El la birda regno.

La plej rapida inter ĉiuj birdoj estas la cipselo (murhirundo). Ĝi flugas ĝis 80 metrojn sekunde. La rapideco de la hirundo atingas nur 60 metrojn.

Inter tiuj du birdoj devas esti nomita la alaŭdfalko, kiu pli rapide flugas ol la hirundo.

Plej alten flugas agloj kaj vulturoj nome 7000 ĝis 7300 metrojn. Tiajn altojn atingas nur grandaj birdoj kun alta korpvarmo, ĉar la aera temperaturo tie atingas minimume 40 Celsius-gradojn minusajn.

Kabilaj terpomoj en Svedujo.

Sveda komercisto vojaĝis antaŭ kelkaj jaroj inter la kabiloj en Atlasmontoj, en norda Afriko, kaj tie li trovis novan specon de terpomoj, kiuj estis multe pli bongustaj ol tiuj, kiuj ordinare estas kulturataj en Svedujo. Li sendis kelkajn da ili al sia sveda hejmo, kaj en Svedujo ili nun fariĝis hardita speco, kiu plene alkitimiĝis al la klimato. Sub nomo de « kabilaj terpomoj » oni la lastan tempon vendis ilin en la sveda merkato.

Tra la mondo

Promenado.

Sur la ŝaktabulo de l' mondo la « granduloj », aŭ kiuj sin opinias tiaj, metas siajn figurojn kaj faras siajn tirojn, — metas, tiras, kaŝobservas, minacas, blufas, insidas, batas, rebatas, atakas, retiras. Tiel naŭze impresas jam la ludo ke, en certaj situacioj, oni volus eĉ preferi ke ekparolu la armiloj. Sed ĉu ni estus certaj ke milito solvus la aferojn pli juste ol traktadoj kaj kompromisoj? Tial tamen estas bone ke la koncernatoj ne perdas la nervojn, ke la « ludo » daŭras, kaj ke la aferojn oni solvos per reciprokaj interkonsentoj prefere ol per la bomboj kaj kanonoj.

Sufiĉas ke furiozas milito en Malproksima Oriento, kaj ke en okcidenta Eŭropo unu popolo mem sin buĉas en fratbatalo; la duan mondmilitigon, pli teruran kaj pli ruinigan ol la pasinta, se ĝi ja devos eksplodi, ni lasu al iu post ni venonta generacio, — la nia travivis jam sufiĉan porcion da mondhistorio sanga, kaj estu donota al ni prefere la ebleco labori ankoraŭ kelkajn jardekojn en paco ol refoje trapasi la angorojn de 1914-1918. Ankoraŭ ne fermiĝis la vundoj de l' pasinta mondmilito, kaj krome la nuna epoko prezentas al ni tiom da problemoj, kiujn ni povos solvi pace, ke duan mondmiliton ni volonte rezignas.

Tial mi esprimas la esperon ke la plej aktuala problemo: la situacio de l' sudetgermanoj en la Ĉeĥoslovaka Respubliko, baldaŭ estos solvita, sen ke eksplodos milito.

La homaro volas la pacon, la plej gravaj nacioj en la mondo ĝin volas, — ĉio pruvas ke unuavice oni nun deziras trankvile labori; eĉ la borsoj montras ke, se ne estus ĉiam novaj « incidentoj », ili tendencus al nova restariĝo ekonomia, kaj tian la mondo ja urĝe bezonas.

Barbareco.

Ekzistis jaroj, kiam oni opiniis ke la terminon barbareco oni povos iom post iom forstrecki el la vortaro de civilizitaj popoloj, kaj ke la homoj fakte iam fariĝos — homaj. Sed multloke ni nun spertas la malon. Oni armadas por la plej barbara milito; oni jam aplikas la barbarajn rimedojn, bombardante urbojn kaj vilaĝojn sen militista celo; oni devigas centmilojn da homoj forlasi sian patrujon; kaj denove oni martiras homojn kiel en la mezepoko.

Ke la tendenco al nova barbareco kaptas ankaŭ la individuojn, — kiun povus tio en la montritaj cirkonstancoj mirigi! Okazis en malliberejo en Philadelphia ke kelkaj gardistoj enpenetrigis varmegan vaporon en du ĉelojn, kiuj loĝiĝis ses malliberulojn. Eble ĉi tiuj estis grandaj krimuloj; sed tio ne estus

kaŭzo por rifuzi ankaŭ al ili homecan traktadon. La malfeliĉuloj luktis malespere por loko ĉe la pordoj, kie tra fendeto povis enpenetri iom da malvarma aero. Fine ankaŭ la pordoj fariĝis tiel varmegaj ke la kaptitoj brulvundiĝis, kaj kvar el ili falis mortintaj. Eĉ en la najbaraj ĉeloj ekestis tia varmego ke 25 kaptitoj svenis.

Feliĉe tiaj okazoj ne estas ĉiutagaj. Estas tamen hontinde ke en nia glora 20-a jarcento povas okazi io tia.

Leono en preĝejo.

Leono ne estas regula gasto en preĝejo. Sed dum kermeso en nederlanda urbo Sittard okazis ke leono, sin liberiginta el sia cirka kaĝo, kuris en la katolikan preĝejon kiu en tiu dimanĉa mateno estis plenŝtopita de kreduloj. La besto flankenpuŝis per sia kapo la homojn, kuris al la meza navo, poste dekstren al la konfesejo, revenis al la meza navo kaj fine saltis sur la altaron kaj ĥorejon, kie ĝi renversis kelkajn kandeligojn.

La leono kaŭzis inter la homoj grandan konsterniĝon; la pastraro, kiu estis celebranta solenan meson, rifuĝis en la sakristion. Feliĉe, krom kelkaj svenoj, ne okazis akcidentoj, kaj la cirkanoj baldaŭ sukcesis rekapti la leonon per lazoj kaj treni ĝin el la loko sankta en ĝian antaŭan loĝejon.

Akcidentoj.

En ĉi tiuj semajnoj de politika altensio oni ne multe atentis akcidentojn kiuj en normalaj cirkonstancoj terurus la mondon. Tifono en Japanujo, ruiniĝo de aviadiloj, ŝipromoj, — tuta serio da akcidentoj gravaj kaj malpli gravaj suferigis dum la lasta tempo grandan nombron da kunhomoj niaj. Kiel eviti plej eble tiajn malfeliĉajn okazojn, jen problemoj pli solvindaj ol tiuj kiujn kreas potencaĵo, ŝovinismo, kaj la kurbaj vojoj de l' internacia diplomatio.

Fantasta rapideco.

Nin, gefilojn de la 20-a jarcento, jam ne mirigas eksterordinaraj rapidecoj. Ni mem ofte vojaĝis vagonare aŭ aŭtomobile 80-100 kilometrojn en unu horo. Vojaĝante per aeroplano, ni ne miras pri 150-200 kilometroj aŭ pli. Kaj estas ja kredeble ke iam estonte tiu trafikilo, ne trovanta obstaklon en la senlima aerspaco, atingos tian rapidecon ke ĝi sukcese konkuros kun la suno.

Sed ke jam en nia tempo sur limigita terspaco, sur la kompakta grundo, estas atingebla rekordo de pli ol 500 horkilometroj, tio ŝajnas al ni tamen sensacia. Tian rekordon (precize 502,1

km) atingis la angla kapitano G. E. Eyston per aŭtomobilo jam en novembro 1937, sed ĵus li superis sian propran rekordon, veturante per sia 6000-ĉevalpova « Thunderbolt » kun meza rapideco de 556 horkilometroj. Vere fantasta rapideco! *)

Tuta popolo festas.

Dum ekstere en la mondo febre laboras la diplomatoj por solvi problemojn ŝajne nesolveblajn, dum ie kaj ie falas bomboj, ruinigantaj homvivojn kaj valorojn, dume en la ebenajoj ĉe la deltoj de Rejno kaj Mozo festis tuta popolo la 40-jaran jubileon de sia reĝino. Estis je la 31-a de aŭgusto 1898, kiam princino Vilhelmino de Oranio atingis sian 18-an vivojaron kaj samtempe estis kronata kiel reĝino nederlanda. Dum la tempo de ŝia regado la lando kaj popolo nederlanda spertis senekzemplan evoluon, kaj ĝis la nuna tago Nederlando estas kvazaŭ insulo-rifuĝejo en la oceano de l' politikaj antagonismoj en Eŭropo. Dum ĉi tiuj tagoj kaj semajnoj la ĉefaj urboj nederlandaj naĝis en lumo, centoj da ĝojofajroj ekflagris laŭ la marbordoj kaj limoj de la lando, okazis grandiozaj paradoj, kavalkadoj kun pompveturiloj, sportfestoj ktp. Unu sabatan vesperon borderis 600.000 homoj la longan marbordon de Scheveningen por rigardi paradon kaj artfaraĵon de la militŝiparo.

Feliĉa la lando kiu havas tian reĝinon; sed feliĉa ankaŭ la reĝino, por kiu batas la koroj de tia popolo!

Atentinde estas ke en tiuj ĉi tagoj ankaŭ la elstara konstruaĵo de Hago, la Pacpalaco, povis festi la jubileon de sia 25-jara ekzistado. Estis je la 28-a de aŭgusto 1913, kiam tiu domo estis inaŭgurata en ĉeesto de la reĝino, la reĝin-patrino, la reĝin-edzo princo Hendrik kaj de Andrew Carnegie, ĝia donacinto.

Nia afero.

La Londona Kongreso estis brila sukceso. Prave oni nomis ĝin « la harmonia kongreso ». Mi ne ripetos kion oni jam legis en la esperantista gazeto.

Nun revenas aŭtuno. Rekomenciĝas la vivo en la kluboj. Nun devas ankaŭ rekomenciĝi laboro ĉiuspeca: aranĝo de instigaj klubvesperoj, instalo de novaj kursoj, varbado de novaj membroj por IEL (precipe MA, MAH kaj MS), de abonantoj por la semajna organo de nia movado (la nunaj abonantoj de « Heroldo de Esperanto » tute ne sufiĉas), kiu post malmultaj semajnoj aperigos sian 1000-an numeron.

Al vigla laboro!

Zigzagoo.

*) Intertempe, Eyston atingis eĉ novan rekordon: 575 horkilometroj.

J. Semmelink :

Centjara Jubileo de la Afrika Migrego

La plej malnova blankula kulturo en Sudafriko estas la tiel nomata holand-afrika, ĉar la unuaj koloniistoj grandparte apartenis al la holanda (nederlanda) nacio. Tiu kulturo montriĝas precipe en propra lingvo (la juna afrika lingvo), eklezia organizo, propra domkonstrua stilo, kaj ankaŭ estas tipa en la bovovagono kaj en la farmbieno.

Dum la evoluo de Sudafriko estiĝis memstara popolo, kiu ĝenerale estas resumita sub la nomo « migrulburoj » (« buro » devenas de la nederlanda vorto « boer », pr. bur, kiu signifas: terkulturisto, kampulo). La agrabla klimato allogis la unuajn koloniistojn migri. La lando estis vastega kaj maldense loĝata. Do kiam la brutaro tre grandiĝis, aŭ kiam la sekeco kaŭzis mankon de herbnutraĵo, ili migris portempe al aliaj lokoj. Ĉasaĵo estis sufiĉega, do la buroj fariĝis lertaj pafistoj-kuraĝuloj kaj ankaŭ akiris sanegan korpostaton. Necessite en tiuj virgaj regionoj iliaj kutimoj fariĝis simplegaj, kaj la bezonoj reduktiĝis al la plej simplaj. Ili formis la unuajn postenojn de la civilizo en Sudafriko, ĉirkaŭitajn de la bantua primitiveco. (Sub la nomo « Bantu » grupiĝas preskaŭ ĉiu nigrulo de Sudafriko: zuluo, basuto, svazo ktp.; en la grupo la nomo « Kafro » estas donita al kelkaj gentoj.) En danĝeraj tempoj estis neeble voki eksteran helpon, do kompreneble la memfido evoluis ĝis plej alta grado. La severaj cirkonstancoj rezultigis altan mortciferon, kaj pro tio nur la plejfortuloj transvivis. Estiĝis brava, kuraĝa popolo, nedeziranta helpon, simpation aŭ intervenon de alilandanoj, popolo netakseble grava kiel pioniroj kaj landlimloĝantoj (limo de la kafroj). Aliflanke la buroj fariĝis ankaŭ tre liberamantaj, tiel ke ili nur malfacile formis unuecon kaj nevolonte sin submetis al aŭtoritato.

Kiel plej gravaj okazoj en la sudafrika evoluo povas esti nomataj: unue, la rompo de la potenco de l' kolorhaŭtuloj; due, la eltrovo de la orriĉeco de Transvalo, precipe en la Witwatersrand (« Montaro de Blankaj Akvoj »); trie, la fondo de la Sudafrika Unio en 1910.

Post la angla ekposedo de Kaplando en 1806 — tiam la nombro de blankuloj en Sudafriko, limigita de la riveroj Oranje kaj Groot Vis (« Granda Fiŝo »), estis proksimume 26.000, hodiaŭ pr. 2.000.000 — sekvis la forigo de la sklaveco. La indiĝenoj ricevis pli grandan liberecon kaj pli multajn favorojn; eĉ tiugrade ke multajn bovarojn ili ŝtelis kaj forkondukis, samtempe bruligante la biendomojn kaj mortigante blankajn infanojn kaj gevirojn. Tamen al la buroj

estis malpermesite subigi atencintojn, kio kompreneble vekis malkontentecon. Malpliigo de ilia libereco kaj pliigo de angligaj klopodoj estis aliaj kaŭzoj. Precipe kolerigis multajn, ke la 9-an de marto 1815 ses buroj estis pendigitaj — eĉ post rompiĝo de kvar ŝnuroj: « La fingro de Dio », oni diris, ĉar eĉ laŭ la malnova ĝermana popolkredo tiaokaze la kondamnitaj devus esti liberigitaj! La neforgesita loko estas nomata Slagtersnek, t.e. Montpasejo de la buĉistoj. Frape estas ke ne nur la buroj sed ankaŭ parto de la kvar mil anglaj koloniistoj, kiuj surbordiĝis en Algoa-golfeto — kie poste oni fondis la urbon Port Elizabeth —, fariĝis ribelemaj. Malgraŭ ĉio la tiama reganto Lord Charles Somerset semis ankoraŭ pli multe da malamo per tio ke li proklamis la anglan lingvon kiel la solan oficialan en Kapkolonio en 1822, kaj la anglan monon kiel pagilon; la indiĝenoj ne plu bezonis pasporton, do oni ne plu povis serĉtrovi la bovoŝtelistojn. Dum la regado de d'Urban el Londono oni redonis teron al la kafroj. — Longtempe la kontrasto, kiu naskiĝis dum la jaroj 1814-1835, difinis la rilaton inter brito kaj afrikano.

La buroj elektis la liberecon; ili intencis malfermi la vastajn herbejarojn norde de la Oranje-rivero. « Migru, migru! » sonis la krio tra kamparoj kaj vojoj de post 1834. Unu partio tion nomis: ribelo; la alia: laŭleĝa dezirego al libereco. Same kiel la ĝermanoj en la epoko de l' granda popolmigrado oni ekmarŝis kun virinoj, infanoj kaj bovaro. Ĉiu grupo havis sian estron. La lando, kien la buroj enmigris, la nuna Oranje-Liberŝtato, estis neeloĝata: la reĝo Moselekatse — tiutempe armeestro de la zulu-reĝo Dingaan — kun siaj matabeloj (« Matabele » = bantua gento) elmortigis la praloĝantojn: buŝmanojn kaj hotentotojn.

La plej bone konataj grupkonduktantoj de la buroj estis Louis Trichardt kaj Jan van Rensburg, kiuj jam en 1834 formigris al la norda Transvalo kaj al Delagoa-golfeto, kie la grupanoj grandparte pereis. Hendrik Potgieter kaj aliaj forveturis en 1836; en la lando de la Transvaal-rivero (« vaal » signifas « pala », pro la brunpala koloro de la akvo) la matabeloj tre malhelpis ilin, sed la buroj sukcesis rebati la atakegon ĉe Vegkop (pr. veĥkop) en la Liberŝtato. Tio okazis en la jaro 1837, kaj Moselekatse reiris trans la Limpopo-riveron, en la nuna Rodezio. Kiel generaloj-komandantoj de la Migro samjare estis elektitaj Gerrit Maritz kaj Piet Retief, kiuj bedaŭrinde ne interkonsentis. Tiu

malunueco ĉiam estis kaj ankoraŭ estas la plej malbona karaktereco de la nacio. Jam en 1837 ses mil migrulburoj estis forlasintaj la Kapkolonion, sed la tuta nombro de migruloj estis proksimume 12.000 personoj, nomitaj la « Voortrekkers » (= antaŭmigruloj). Piet Retief serĉis la maron, transiris la 2500 metrojn altajn Drakensberge (Montoj de la drakoj) kaj intertraktis kun la zulu-reĝo Dingaan. Kun tiel nomita komando (armeparto) de 5 buroj li eniris la reĝejon en Umgungundhlovu. Dingaan subskribis la kontrakton de cedo de Port Natal kaj ĉirkaŭaĵo al ili; sed subite liaj militistoj atakis, kaj ĉiuj buroj estis mortigitaj (6.2.1837). Ankaŭ la vagon-tendaron de la buroj apud la nuna vilaĝo Weenen (tio signifas « plori ») la zuluoj atakis kaj la homojn mortigis. Nur tre malmultaj sin forŝavis el la masakro, inter ili Gerrit Maritz.

La estonteco ŝajnis malhelega kaj malsarena. Novan esperon alportis la sciigo ke Andries Pretorius (la urbo Pretoria ricevis de li kaj de lia filo la nomon), viro kun forta kaj fundita reputacio, kun nova migrularo foriris el Kaplando. Sub lia gvidado, vagontendaro kiel fortikaĵo estis starigita apud la nuna Bloed-rivero (pr. blud = sango) 460 rajdantaj buroj estis tie. Fariĝis dimanĉo, la 16-a de decembro 1838, kiam 12.000 zuluoj de Dingaan atakis. Terura sangobano okazis. Falis 3000 zuluoj, kaj la resto devis forkuri. Dingaan rifuĝis, kaj la blanka kulturo estis certigita. En 1839 estis fondita la Natala ĉefurbo Pieter-Maritzburg.

Laŭ sankta promeso ĉiujare ni solenas *Dingaans-tago* (16-an de decembro), sed nunjare estos la centjara datreveno de la venko de l' blanka civilizo en la suda parto de la nigra kontinento. Nia ĉefministro generalo Herzog metos la unuan ŝtonon de grandega t.n. Antaŭmigrula Monumento apud nia administracia ĉefurbo Pretoria.

Sed ni rememoras kaj honoras niajn pragepatrojn ankaŭ per *nova bovovagona migro*. Je la 8-a de aŭgusto du novaj vagonoj, precize kiel la antaŭmigrulaj vagonoj, foriris de la Jan-van-Riebeeck-monumento (li alboridiĝis apud la Tablomonto en 1652) en Kaapstad (Cape-town). Specialaj leterkovriloj estas eldonitaj, kun alpage por la monumento. Oni povis sendi la leterojn per la bovovagonoj, kiuj nun estas veturantaj dum pli ol kvar monatoj tra Kaplando, Oranje-Liberŝtato kaj Transvalo, aŭ Natalo (la kvar provincoj de la sudafrika Unio). Je Dingaans-tago la unua vagono atingos la lokon de la Antaŭmigrula Monumento apud Pretoria, kaj la duan la lokon de la batalo apud Bloed-rivero en Natalo. Tiam la kunportitaj leteroj estos ekspedataj al la adresatoj kun speciala memorpoŝtstampo

Lulu

Jen Lulu. — Lia patrino vendas gazetojn sur la publika vojo. Li estas infano de l'amo, infano de l'virina amo.

Kompense de tio, ke li ne konas sian patron, li estas la plena heroo bildo de ĉi tiu. Kvinjara, li jam havas ŝultrolargecon kaj maltimon. Li estas memfida kaj trudvolema. Li estas bruna kun larĝa frunto. Li havas belajn, kaŝankolorajn inteligentajn okulojn, sed li dediĉas ilin al neniu. Lia rigardo estas tiom okupita, ke ĝi neniam fiksiĝas pro pura afableco.

De pluraj monatoj, kiam li vizitadas la lernejon, Fraŭlino tie aŭ ĉi tie, laŭ okazo, trudoferis al li bombonon, fuŝriparis lian antaŭtukon, viŝtuŝetadis ŝvelkontuzaĵon. Li akceptis tiun flegadon, kvazaŭ oni ŝuldus tion al li, kaj kun malpacienca deziro esti liberigita.

Ĉifoje, Fraŭlino, sidanta apud tablo en angulo de la korto, lin vokas: « Nu, Lulu, kion vi volas ludi sur la korto? Kion vi preferas ludi? Kiun vi plej ŝatas ĉi tie? — Nu, babilu iom kun mi! »

Lulu kapsignas: tio estas sensencaĵo! Li subrigardas al la skatolo metita sur la tablon, kaj kiel respondon li postulas: « Bombonojn! » « Bombonojn, kiom vi estas postulema! Mi alte taksas miajn bombonojn! Jen unu. Sed kial vi ne komencas paroli al mi afable? Vi movas la kapon, vi ne aŭskultas min; tio ne estas karula... Vi tamen scias, ke mi multe amas vin. »

« Jes. » — Reala konvinko, sed igita je fraŭlina tono, do sen plaĉa sekvo de l'flanko de Lulu.

« Kaj min, ĉu vi amas min iom? »
« Ne. »

Tio estas pura sincereco, samkiel oni demandus al li: Ĉu vi havas naztukon? Lulu ne bezonas esti plaĉa aŭ malplaĉa. Li diras ĉiam kion li pensas.

« Ho, vi ne amas min! Tiokaze mi ne plu donos al vi bombonojn. »

Post rapida pripenso, kun akriĝitaĵo

Laŭ melodio amata:

Karl Vanselow:

Kanto de Turiddu

(Melodio de Pietro Mascagni el la opero « Cavalleria rusticana ».)

Ho Lola, alrigardi vin, diina,
Signifas sen reteno kaj sen savo
Pro ravo nedirebla kaj senfina
Fariĝi por-eterne via sklavo.

Al kiu ajn vi donas am-esperon,
Eĉ la ĉielon tiu ne sopiras,
Kaj ĝoje sekvas mi en la inferon,
Se ne la paradizon vi eniras.

okuloj plenaj de koncentritaj pensoj, li eligas la klaran respondon de natura saĝo:

« Jes ja! Vi donos ankoraŭ al mi bombonojn. »

« Kiel! Mi ne estas devigata. Kion vi scias pri tio? »

« Nu, kompreneble! Ĉar vi amas min, do... »

Lulu arogante rigardas Fraŭlinon, maltimante la kontraŭdiron, kaj, certa pri la nerefutebla evidenteco, li turnas la dorson kaj forlasas ŝin, tutsimple. —

La sekvantan tagon, Fraŭlino sidas sur la sama loko. Lulu alproksimiĝas al ŝi.

« Bombonojn! »

Fraŭlino, indiferenta, montras la skatolon, metita sur la tablon, kaj diras per senakcenta voĉo: « Prenu el ili, se vi volas! »

Lulu ekfaras geston, sed li retiras la manon.

« Kion vi deziras? » demandas Fraŭlino. « Ĉar vi scias, ke mi ĉiam donos al vi. »

Lulu retrovas sian memoron, li konsideras ĝin interne kaj ekzamenas Fraŭlinon:

« Mi ne volas ilin tiel... Mi atendas, ĝis mi amos vin. » —

Du tagojn poste en la samaj cirkonstancoj, li alproksimiĝas kun petanta rideto: « Nun, mi amas vin. »

« Kiel vi scias, ke vi amas min? »

La sincera vizaĝo signifas: « Bela demando! Estas tutsimple! Mi scias, ĉar mi sentas vin amikino, kaj tio donas al mi emon por esti afabla al vi: por esti iom flanke de vi. »

« Antaŭe vi ne amis min. Ĉu tio okazis al vi subite? »

Li levas la ŝultrojn: Dio, kiom stulta ŝi estas!

« Ne subite. Antaŭe, tio ne postulas grandan sagacon, mi ne rigardis vin. Mi komencis rigardi vin, pensi pri tio... »

« Ha! Kion vi vidis? »

Lulu levas la ŝultrojn pli forte: Estas bedaŭrinde esti tiom malinteligenta! Estas videblaj aferoj, kiujn oni ne povas klarigi per vortoj, ĉar oni komprenis ilin senvorte. Oni devas denove montri ilin. Lulu komencas ripeti, kun la tonnuancoj kaj la diversaj mimikoj, la unuan scenon en tiu kortangulo.

Li imitas sian propran postuleman voĉon: « Bombonojn! »

Nun, la dolĉan kaj akcentitan voĉon de Fraŭlino, kaj ŝian manon metita sur la skatolon: « Diru do, mi alte taksas miajn bombonojn. Kaj vi ne estas karula. Vi scias, ke mi amas vin! »

« Jes. »

« Kaj vi, ĉu vi amas min? »

« Ne. »

Lulu iras kelkajn paŝojn flanken kaj revenas sur la saman lokon por komprenigi, ke estas la sceno de la sekvanta tago: « Bombonojn! »

Kviete serioze, en mirinde esprimplena maniero, li faras kion Fraŭlino komprenigis. Li forpuŝas la skatolon indifere; li faras malĝojan mienon: « Prenu, se vi volas! »

Post mallonga silentado, li ridas por sciigi: « Jen! Mi esperas ke vi komprenis, nun! » Kaj Lulu reprenas sian nunan personecon. Li metas la skatolon en la manon de Fraŭlino, li sentas la veran frandemon: estas ne li, kiu prenos! Oni regalos lin. Tio ne estas la samo.

Efektive, Fraŭlino prenas bombonon kaj prezentas ĝin al li, belete ridetante. Sed Lulu rapide kaŝas siajn manojn malantaŭ sian dorson: Nu, oni tamen povas diveni tion! Estos pli ameme: Fraŭlino devas emeti sian bombonon en la bekon mem!

Ŝi komprenas. Ŝi proksimiĝas la bombonon, ŝi premas ĝin kontraŭ liajn lipojn, sed la beko restas fermita, dum la okuloj ekbrilegas...

« Jes ja, mia kompatinda knabino; lernu do, kormoliĝu, estu feliĉa... nu, por malfermiĝi bekon, oni alproksimigu antaŭe sian vangon... »

El « Sentiments » de Léon Frapier
Tradukis Yvonne Bruc.

SUR LA MARSO

Sur la Marso, ne sur Tero,
Vivo estas nur mizero:
De l' lulilo ĝis la morto
Premas homojn peza sorto;
Zorgoj, penoj, necerteco,
Korĉagrenoj — ĉia speco,
Krizoj, ftizoj, deficitaj,
Gripo, vipo de militoj!
Vere, viv' estas mizero
Sur la Marso, — ne sur Tero.

Sur la Marso, ne sur Tero,
Riversiĝis vort' kaj vero:
Idealoj de jarcentoj
Nun forflugis kiel ventoj; —
Novajn diojn oni levas,
La malnovaj fugi devas;
Sed la « novajn » — ho inkubo! —
Oni fosis... el la rubo!
Riversiĝis vort' kaj vero
Sur la Marso, — ne sur Tero.

Sur la Marso, ne sur Tero,
Sub la signo de l' Espero
Luktas brava ŝtormtaĉmento
Kun fervor', temperamento
Per kuraĝaj, akraj batoj
Kontraŭ — siaj propraj fratoj!
Kontraŭ malamika mondo
Luktas ĝi — per korespondo
Sub la signo de l' Espero:
Sur la Marso, — ne sur Tero.

Sur la Marso, ne sur Tero,
Regas, fakte, la Infero.
Kia terur-katarakto,
Dolortrakto, ĝembarakto!
Kontraŭ tio, nia paca,
Pia Stelo kun aŭdaca
Sia glora civilizo
Estas pura paradizo.

Tamen vivus mi prefere
Sur la Mars', anstataŭ tere!

Angeloj el Infero

(El « Magazine Digest », Febr. 1938.)

Fred Croft en « Coronet » skribis ke ne estas ĝenerale konata kia inferulo estas la belega cigno, ke ĝia gracieco subkaŝas sovaĝan naturon unuigante la perfidon de la serpento, la furiozecon de la sovaĝkato kaj la tenemon de la dogo.

Eric Baumer, sep-jara filo de Dortmundunda fabrikisto, promenis kun Lisa, la vartistino, sur la bordoj de rivero. Dum la knabo akvotrais, Lisa sidis sub arbo, eble dudek futojn distance de li. Tri cignoj alvenis naĝante ĉirkaŭ kurbo de la rivero. Eric estis du futojn de la bordo en unu futon profunda akvo. La cignoj alvenis al li, formis duoncirklon, rigardegis lin dum malmultaj sekundoj. Lisa maltrankviliĝis kaj alvokis ke li revenu. Ŝi faris apenaŭ ses paŝojn, kiam la meza birdo sin ĵetis al Eric, tiris lian ĉemizantaŭtukon per sia beko kaj tiris la infanon per sia pezo en pli profundan akvon. La terurita knabino ekkuris. Unu el la cignoj elvenis el la akvo ŝin renkonti. Spite ke ŝi klopodis preterpaŝi la birdon, tempo estis perdita kaj la cigno posttiris la infanon pli malproksimen. Lisa kuris kriegante por helpo.

Du viroj kuris al la riverbordo, sed la tempo perdita estis fatala. Ili kuris, ĝis ili vidis la cignojn kiuj bategis la knabon. Li estis tro malproksime por esti savebla. Ili ne povis naĝi. Ne estis boato pli proksime ol mejlon. Piediri estis malutile. La viroj ne povis alproksimiĝi pli ol sesdek futojn al la loko de la murdo kiu okazis antaŭ iliaj okuloj.

Jean Carpin veturis per sia biciklo en la ĉirkaŭaĵo de Metz en 1925. Fluganta cigno falis sur lin el la ĉielo kaj per du sovaĝaj bategoj de sia beko en du sekundoj ĝi disrompis lian nazon kaj elpuŝis lian okulon. Vilaĝano alvenis kun rompita rastilo kaj bategis la birdon. Alia cigno malsuprenflugis, rompita la brakon de la vilaĝano per bato de sia flugilo kaj ĵetis lin teren, dum apuda vidanto prenis la rastilon de la vilaĝano, batalis kontraŭ la bruta birdon kaj mortigis ĝin.

Ankoraŭ: Antaŭ kvar jaroj, kvar nigraj cignoj estis senditaj el Aŭstralio al la Vintners' Co., kiu posedas ĉiujn cignojn sur la rivero Tamizo en Anglujo. Dudek personoj vidis la kvar cignojn batali kontraŭ ses blankaj cignoj tuj, kiam la du grupoj ekvidiĝis. Dum dudek minutoj la rivero estis plenigata de sanga ŝaŭmo. Oni aŭdis la sibladon je distanco de kvaronmejlo. La batalloko estis kvaŝaŭ kaldrono, el kiu dek torniĝantaj koloj eliĝis simile al frapantaj serpentoj. La venka blanka grupo ĉirkaŭkovris la riveron per siaj plumoj kaj sango.

Cignoj mortigis hundojn tre ofte, dronigis infanojn, atakis kaj forkurigas

homojn, farinte al ili seriozajn vundojn.

Vulphundo sin ĵetis sur cignon en Glasgovo en majo 1937. La virbirdo senkonsciigis la hundon per multaj batoj, tiam ĝi tenis ĝin per la kolo kaj dronigis ĝin en la fluo. Antaŭ tio, en 1930, la kvina el serio de hundoj malaperis. Li batalis kontraŭ Hercules, la maljuna vircigno en Hampstead-Heath-cignolageto, Londono. Tien kaj reen sur la vojeto kaj trans la herbejon la siblanta miksamaso de felo kaj plumoj ruliĝis. La hundo malfortiĝis. La cigno terure bategis la beston per siaj flugiloj kaj beko, ĝis kiam ĝi estis senmova, sangokovrita. — ekkomencis forviŝi per ĝi la vojeton kaj, interrompente de knaboj kiuj alvenis por savi la hundon, trenis la kadavron al la mezo de la lageto por plenumi la lastajn dronigojn. Dum du monatoj Hercules mortigis ok hundojn, antaŭ ol mistera pafo en la nokto finis lian karieron.

Esperantigis, A. W. Weigall,
Vancouver.

La patrino koro

Franca fabelo.

Fraŭlo amis knabinon; sed la knabino estis vanta kaj senkora.

Iam ŝi songis, ke ŝi restos por ĉiam juna kaj bela, ja eĉ plibeliĝos, se ŝi konservus en sia ŝranketo la koron de tiu virino, kiu naskis la junulon ŝin amantan.

Iutage ŝi diris al la fraŭlo: Iru kaj mortigu vian patrinon, ŝiru la koron el ŝia korpo kaj alportu ĝin al mi, por ke mi eterne amu vin kaj restu bela kaj juna!

«Ne postulu de mi tian teruran agon!» elvokis li.

Sed ŝi kisis lin kaj parolis inter kiso kaj kiso: « faru tion!... ».

Li disigis sin de ŝi kaj forkuris.

Tamen, la sekvantan tagon li revenis, kaj denove la knabino postulis: « Iru kaj mortigu vian patrinon, ŝiru la koron el ŝia korpo kaj alportu ĝin al mi, por ke mi eterne amu vin kaj mi por ĉiam restu bela, juna kaj feliĉa! »

« Lasu min! »

« Se vi ne volas, tiam faros tion iu alia, kiu min vere amas, kaj tiu poste estos mia plej amata... », parolis la knabino kaj forlasis la junulon.

Malesperante li dum la tuta tago vagadis tien kaj tien, kaj kiam malheliĝis, li hejmenkuris kaj agis, kiel la knabino ordonis.

Kurante en la malhela nokto kun la patrino koro al sia amatino, li faletis kaj terenfalas.

Dum li ĝemplendante ekleviĝis, la sanga patrino koro lin demandis: « Ho ve! Ĉu vi vundis vin, kara filo? ».

Trad. St. Z.

Rido Sanigas

Lia lasta volo.

Li estas edziĝonta. Li sidas en la domo de l' estontaj bogepatroj. La fianĉino ĉeestas. La fianĉo tre decide donas instrukciojn:

— Mi volas ke nia geedziĝo okazu akurate je duond post la deka. Poste mi volas havi bonan tagmanĝon kun la plej proksimaj familianoj kaj plej intimaj gekonatoj, kaj post tio mi volas ekvojaĝi kun mia junedzino.

Kiam la fianĉo estis foririnta, la patrino de la fianĉino ne povis sin deteni rimarkigi:

— Via estontulo volas ankoraŭ tre multon.

— Ho, lasu lin! diris la fianĉino. — Ĉiukaze tio estas lia lasta volo.

Li konas la edzinon.

Sinjoro en modmagazeno.

— Bonvolu doni al mi bluzon.

— Kiu koloro? demandas la vendistino.

— Egale! Donu kiun ajn!

— Kiu mezuro?

— Ankaŭ egale.

— ???

— Nu jes, ĉiukaze ĝi estos reportata por interŝanĝo.

La problemo.

— Pri mia edzino — apenaŭ eltenebla plu. Matene, tagmeze, vespere ŝi postulas de mi monon.

— Kion do ŝi faras per tiu tuta mono?

— Jes, tion ankaŭ mi ne scias. Mi ankoraŭ ne donis ĝin al ŝi.

Kial?

— Paĉjo, aŭskultu momenton!

— Ja, bubo, kio estas?

— Paĉjo, kial virinoj ne soldatiĝas?

— Nu, ĉar soldatoj devas obei!

Edukita.

— Ho, « Faŭsto » — la grandioza dramo! Ĉu ankaŭ vi admiras tiun Goethe?

— Goethe? Ĉu li ne estas tiu viro, kiu skribis la multajn sentencojn por ŝirkalendaroj?

Koncize.

Iu sinjoro instruis al sia servisto kompreni perfekte liajn dezirojn, kiam li, la sinjoro, diras al li nur unu vorton. Kiam, ekzemple, post el-litiĝo, li vokas nur: « Matenmanĝon! », tiam devas krom la kafo, kremoj, sukero, pano, butero, fromaĝo kaj ovo troviĝi sur la tablo ankaŭ la matenĵurnalo, la poŝtaĵoj, apude surtuto kaj ĉapelo, kaj antaŭ la domo devas pret-atendi la aŭtomobilo.

Iumatene li kriis el sia dormoĉambro la solan vorton: « Malsana! »

La servisto malaperis kaj revenis nur je tagmezo.

« Kie vi estis tiel longan tempon? » demandis la sinjoro.

« Mi vokis kuraciston, elektis tombon, aĉetis ĉerkon, mendis funebro-kronojn kaj donis mortanoncon al la gazeto. »

La bona filo.

— Infanoj nuntempe kaŭzas zorgojn. Ĉu ankaŭ vi havas infanojn?

— Jes, unu filon.

— Ĉu li ankaŭ fumas la tutan tagon?

— Ne, li ne scias kio estas cigaredo.

— Ĉu li foje drinkas, aŭ ĉu li forrestas tut-tage?

— Ne, nenio pri ĉi ĉio.

— Kaj ĉu vespere li neniam venas hejmen malfrue?

— Ne, post la vespermanĝo li ĉiam tuj ekdormas.

— Kia feliĉa patro vi estas! Mi envidas vin. Kaj kiun agon havas via filo?

— Postmorgaŭ li fariĝos sep-monata.

(« Kikeriki ».)

LA ESPERANTISTA REKLAMO

La prezo de anoncetoj

estas egalvaloro de 10 belgaj frankoj aŭ 0.60 ned. guldeno, por la unuaj 20 vortoj aŭ mallongigoj; por ĉiuj pliaj 10 vortoj komencitaj 5 belgaj frankoj aŭ 0.30 guldeno. La anoncetoj aperas en la semajna kaj (laŭ la disponebla loko) monata organoj de Internacia Esperanto-Ligo, nome en « Heroldo de Esperanto » kaj « Esperanto Internacia ». Por mendi anoncetojn, oni turnu sin al la Administracio de **Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando; nederlanda poŝtĝiro 1306.30 ('s-Gravenhage); belga poŝtĝiro 2044.04 (Bruxelles).**

Edziĝo. Dum lastaj monatoj edziĝis en Praha, Ĉeĥoslovakio, s-ro D-ro **Tomáš Pumpr**, supera komisario de Ministerio por Internaj Aferoj kaj esperantisto, poemtradukanto (« Bukedo »). — Koran gratulon!

Geedziĝo Grolleman-Hobé. Gesamideanoj Wessel Grolleman, prezidanto de la nederlanda Esperanto-asocio LEEN, **Culemborg**, kaj Pieterina Bartha Hobé en **Maurik** geedziĝis la 21.9.1938. — Ni kore gratulas.

Letervespero. Klubo Esperantista de Malmö aranĝas letervesperon la 1.11.1938. Ni atendas multajn leterojn kaj kartojn. Almenaŭ unufoja respondo certigita. Adreso: Kamrer-gatan 3, **Malmö**, Svedlando.

Letervespero. La Esperanto-Klubo Klippan aranĝos letervesperon la 7.11.1938. Skribu al: Fraŭlino Britta Lindblad, aŭ s-ro Gösta Ljunggren, **Klippan**, Svedlando. Respondo garantiata.

Esperantistoj ĉiulandaj! 23-jara aŭtomobil-muntisto deziras interesan korespondon kun ĉarma kaj inteligenta knabino por pens-interŝanĝo. Interesiĝas pri naturo, lingvoj, filmo, literaturo kaj vojaĝoj. S-ro Frick Sjöberg, Stubbetorp, **Norrköping**, Svedujo.

Teknika studento deziras interŝanĝi gazetojn de lernejoj kamarad-klubo. Svedlingvaj kun traduko kontraŭ gazetoj el aliaj landoj parte tradukitaj. Mi ankaŭ korespondas pri teknikaj problemoj, speciale domkonstruaj. Certe respondas. Tekn. studento P. W. Söderström, Svartmangatan 8, III., **Stockholm 2**, Svedujo.

Germano petas filatelistojn el la tuta mondo sendi 50 diversajn poŝtmarkojn por 50 germanaj poŝtmarkoj. Tuja forsendo garantiata. Max Scheinost, Moltkestr. 15, **Schwenningen a. N.**, Germanujo.

Mi deziras korespondi kaj interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn kun ĉiulandaj gesamideanoj. Respondo certa. Emilo Klimsza, **Dolní Suchá 304, Silezio**, Ĉeĥoslovakio.

Mi deziras korespondi kun svedoj kaj eksterlandanoj. Knut Stål, Box 221, **Smedjebacken**, Svedlando.

Mi deziras korespondi kun anoj de malproksimaj landoj. Miaj special-interesoj estas lingvistoj kaj monokolektado (moneroj). 16-jara junulo. Mi certe respondos. Hilding Dahlkvist, Ovanda, **Borlänge**, Svedlando.

Nederlando: S-ro N. Zilver, Zach. Jansestraat 53, **Amsterdam**, deziras poŝtmarkojn kaj bildkartojn el aliaj landoj (Centra Eŭropo nur laŭdeziro). (529)

Estona fraŭlino serĉas amikon. Linda Teras, **Narva-Jõesuu**, Vabaduse tän 8, Estonio.

Kial legi neinteresajn librojn, se ekzistas interesa legaĵo? Ĉu vi jam legis « La mondon al ni! » de E. Kilian? Ĝi kostas nur 0.60 guldenon kaj estas havebla ĉe ĉiu esperantista librejo, kompreneble ankaŭ ĉe la Librofako de Heroldo de Esperanto, **Scheveningen, Nederlando**. (543)

Perfektigi en nia lingvo estas la deziro de ĉiu samideano. Tre taŭga libro por tio estas la « Internacia gramatiko » de Leopold Kitzler, kiu estas verkita ekskluzive en Esperanto. Prezo guld. 1.20, inkl. sendkostoj, ĉe la esperantistaj librovendejoj aŭ ĉe la Librofako de Heroldo de Esperanto, **Scheveningen, Nederlando**. (544)

Sendu vian foton/adreson kaj profesion! Vi tuj ricevos grandan kolektaĵon da fotografiaĵoj kun adresoj el 18 landoj **senpage**. Fot. A. Indrulis, **Laizuva**, Litovujo. (542)

S-ro M. Wauters, delegito de IEL, Dieststrato 184, **Lovenjo**, Belujo, interŝanĝas ĉiajn Esperantaĵojn.

Sendu al S. E. Bohlin, Box 16. **Skövde**, Svedlando, 100 poŝtmarkojn — ne nepre malsamajn — de via lando, kaj vi ricevos la saman kvanton. Ankaŭ interŝanĝas laŭ valoro. Ne sendas unue; certe respondas.

Kongresanoj de la Londona Kongreso! La bulgara kongresano portinta nacian kostumon petas ĉiujn samideanojn, kiuj fotografis lin, sendi grandformatajn kopiojn de la fotografiaĵoj al: Emil Strajev, Str. Car Asen 50, **Sofia**, Bulgarujo. Ĉiuj ricevos rekompence belajn bildojn pri Bulgarujo.

La sekvantaj gesamideanoj bonvolu respondi al Silvia Peterlongo, C. Plebisciti 12, **Milano**, Italujo; Frans P. en Aarschot, Belujo; Ferdinand R. en Teplice-Šanov, Ĉeĥoslovakio; B. B. en Almelo, Nederlando; Karl Ö. en Saltsjö-Järfa, Svedujo; Arseni P. en Pärnu, Estonio.

Izolita samideano, vivanta malproksime de la grandaj kulturcentroj, deziras sian monotonan vivon plivigli per serioza korespondado kaj tial serĉas kontakton kun alte inteligentaj, lertaj kaj spertaj samideanoj el ĉiuj landoj. Respondojn atendas: Aleksandro Kemény, **Makó** (Csanádmegye), Hungarujo.

Mi deziras korespondi per poŝtkartoj kun samideanoj en aliaj landoj, kaj mi promesas respondi poŝtkarton al ĉiu korespondanto. S-ro Oswald Clark, 5, Lawn Avenue, **Doncaster**, Anglujo.

Korespondo. S-ro J. H. Stiel deziras seriozan korespondadon kun gesamideanoj el la tuta mondo pri ĉiaj temoj. Katwijkstraat 123, **Scheveningen**, Nederlando.

Sveda fraŭlino deziras viglan korespondadon kun multaj pri multe. — Jenny Aronsson, **Torshälla**, Svedlando.

Seriozan korespondon pri lingvo, literaturo kaj aliaj temoj deziras: S-ro Kido, **Takasaki**, Japanio.

Malsanuloj! Internajn malsanojn, speciale galŝtonojn, kuracas garantie, baldaŭ, bone kaj daŭre specialisto, laŭ propra bonrezulta metodo. Informojn postulu de: E. Janisch, Táboritská 13, **Praha XI**, Ĉeĥoslovakio.

Junulinoj! Mi deziras korespondadi kun artistinoj-muzikistinoj. Mi estas 25-jara muzikisto. Adreso: Vl. Rimša, Italijos g-vé 65, **Kaunas**, Litovujo. Certe respondos.

Resumoj en Esperanto nepre estu aldonataj al gravaj sciencaj kaj filozofiaj faklibroj naci-lingvaj. Ni realigos tion per starigo de **Bibliografiaj Servoj per Esperanto** en kiel eble plej multaj civilizitaj landoj kaj per reciproka kunlaborado. Inter samideanaj intelektuloj, kiuj arde deziras progresigi Esperanton sur ĉi tiu grava kampo, ni serĉas ankoraŭ kelkajn sindonemajn kunlaborantojn idealistajn en ĉiuj landoj. — Nek politiko, nek altrudo, nek kotizo. — Skribu tuj al: « Esperanto servas! », 11, rue Pougin, **Metz-Montigny**, Francujo. — Ĉiu fosu sian sulkon! (524)

Esperantistoj ĉiulandaj! Petu la senpagan prospekton pri la Isolek-kurso! Internacia perfektiga skriba Esperanto-kurso por ĉiulingvanoj. Diversnaciaj korektantoj (Lingvakomitanoj). Ĉiu aliginto ricevos valoran premion. — Esperanto-Instituto « Isolek », Geleenstraat 66, **Heerlen**, Nederlando. (535)

Nederlandaj Esperantistoj! Petu la senpagan prospekton pri nia skriba kurso por diplomo B. Ĉiu kursano ricevos valoran premion! La « Isolek »-kurso estas famkonata, ĉie laŭdata. — Esperanto-Instituto « Isolek », Geleenstraat 66, **Heerlen**, Nederlando. (536)

BES-Adresaro (nova, 13-a eldono), kun centoj da adresoj de esperantistoj el pli ol 40 landoj, kaj kun 84 portretoj, estas ricevebla por 0.60 gld (inkl. sendkostoj) ĉe: Heroldo de Esperanto, **Scheveningen**, Nederlando. (523)

Kvakerismo kaj Paco. Por senpagaj ekzempleroj de literaturo (Esperanta kaj angla) skribu al Friends Service Council, Friends House, Euston Road, **London N.W. 1**, Anglujo. (432)

Nekatolikoj senpage povas ricevi informojn pri la katolika kredo ĉe la « Internacia Katolika Informejo », Fraterhuis, de Vliert, **'s-Hertogenbosch**, Nederlando. (526)

Sendu al mi nestampitajn poŝtmarkojn en valoro de duobla franko de letero eksterlanden, kaj vi ricevos **ŝlosilon de Internacia Korespondado** kun 77 frazoj en 5 lingvoj. — Ant. Prazák, **Jablunné n. Orl.**, Ĉeĥoslovakujo. (539)

Sperta komercisto (judo) deziras interrilatojn kun komercistoj el ĉiuj landoj, havantaj komercajn interesojn en Germanujo (imperto, eksporto, reprezentado aŭ simile). Bonvolu skribi al: Lagerkarte Nr. 107, **Berlin C. 76**, Germanujo. (540)

Senpage publikigas adresojn de geknaboj, kiuj deziras korespondi, la monata infangazeto « La Vojo ». Adreso Redakcio: Marathonweg 15, II., **Amsterdam**, Nederlando. (453)

Ĉeĥoslovakaj gesamideanoj! Vizitadu nian asocian oficejon en **Praha II**, Truhlářská 16, kie vi trovos diversajn Esperanto-gazetojn kaj propagandan materialon! Vintre ni intencas aranĝi en la oficejo ĉiutagajn kunvenojn, kie oni havos okazon konversacii kaj renkontiĝi kun gesamideanoj. En asocia librovendejo estas riceveblaj ĉiuj Esperanto-legaĵoj kaj diversaj Esperantaĵoj. Oni akceptas ankaŭ abonpagojn por Esperanto-gazetoj. — N. C.

Por aŭtuna propagandlaboro! Lumbildserio pri Esperanto (60 sur filmrubando por normal-kino) nur sv.fk. 4.— afrankite ĉe Hungara Skolta Esperanto-Fondo, per adr. P. Balkányi, Kreditbanko, **Budapest 507**, Hungarujo. (541)

Presejo de Belga Esperanto-Instituto K. S. Antverpeno — Belujo.

